CERCLE ESPERANTISTE

DON JUAN

AŬ

LA ŜTONA FESTENO

KVINAKTA KOMEDIO

DE MOLIÈRE (MOLJERO)

1665

TRADUKIS

EMILE BOIRAC

Rektoro de la Dijona Universitato



FRANCUJO. — HACHETTE et Cie, *PARIS*.

ANGLUJO. — « REVIEW of REVIEWS », *LONDON*.
DANUJO. — ANDR.-FRED. HÖST & SÖN, *KJÖBENHAVN*.
GERMANUJO. — MÖLLER & BOREL, *BERLIN*.
HISPANUJO. — J. ESPASA, *BARCELONA*.
ITALUJO. — RAFFAELLO GIUSTI, *LIVORNO*.
POLUJO. — M. ARCT, *WARSZAWA*.

KOLEKTO ESPERANTA APROBITA DE Dº ZAMENHOF

FRANCUJO. — HACHETTE kaj Kº, 79, Boul. St-Germain, Paris

LIVRES D'ÉTUDE

Grammaire et Exercices de la langue Esperanto, par L. de Beaufront. 1 50
Corrigé de Grammaire et Exercices de la langue Esperanto, par L. de Beaufront. . . . . » 75
Commentaire sur la grammaire Esperanto, par L. de Beaufront . . 2 »
Texte synthétique des règles, préfixes, suffixes, expressions de l'Esperanto, traduction française en regard, par L. de Beaufront . . » 50
Thèmes d'application, *Lexicologie*, *Syntaxe*, *Formation des mots de l'Esperanto*, vocabulaire des mots employés, par L. de Beaufront . . 2 »
Cours commercial d'Esperanto, par Marissiaux. 1 50
Corrigé des exercices du Cours commercial d'Esperanto, par M. Marissiaux. . . . . 1 »
L'Esperanto en dix leçons, par Th. Cart et Pagnier. . . . . » 75
Corrigés des Exercices de l'Esperanto en dix leçons, par Th. Cart et M. Procureur . . . . . » 50
Premières leçons d'Esperanto, par Th. Cart. . . . . » 30
Dictionnaire Esperanto-Français, par L. de Beaufront. 1 50
Structure du dictionnaire Esperanto. *Réponse à beaucoup d'objections.* (Teksto esperanta kaj franca), par L. de Beaufront. . . . . » 30
Vocabulaire Français-Esperanto et **Vocabulaire abrégé Esperanto-Français**, par Th. Cart, M. Merckens et P. Berthelot 2 50
Vocabulaire des mots spéciaux à la philatélie, par R. Lemaître. . » 40

TEKSTOJ EN ESPERANTO

Brueys et Palaprat. *Advokato Patelin*, tradukita de J. Evrot. . . » 75
Diversaĵoj, rakontetoj tradukitaj de Sᵉᵘ Lallemant kaj Beau. . . . 1 25
Ekzercoj de Aplikado, *Leksikologio*, *Sintakso*, *Vortfarado Esperantaj*, de L. de Beaufront. . . . . 1 »
Esperantaj prozaĵoj, de diversaj aŭtoroj. 2 50
Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto, de Dʳᵉ Zamenhof. . 3 50
Fundamento de Esperanto, de Dʳᵉ Zamenhof. . . . . 3 »
Godineau. *La Koloriĝisto-aerveturanto*. . . . . » 30
Hamleto, dramo de Shakespeare tradukita de Dʳᵉ Zamenhof, *nova eldono*. . . . . 2 »
Komercaj leteroj, de P. Berthelot kaj Ch. Lambert . . . . . » 50
Kondukanto de l'interparolado kaj korespondado kun aldonita Antologio Internacia, de Grabowski. . . . . 2 »
Kurso tutmonda, de E. Gasse. . . . . » 75
Labiche et Legouvé. *Cikado ĉe Formikoj*, unuakta komedio. . . . » 60
La Fontaine. *Elektitaj Fabloj*, esperantigitaj de G. Vaillant. . . » 75
La Komerca sekretario, de Ros Sudria. . . . . » 50
Leibniz. *Monadologio*, tradukita de E. Boirac. . . . . » 60
Maistre (X. de). *Vojaĝo interne de mia Ĉambro*, tradukita de S. Meyer. . . . . » 75
Matematika terminaro kaj krestomatio, de R. Bricard. . . . . » 75
Molière. *L'Avarulo*, tradukita de S. Meyer . . . . . » 75
Orzesko. *La interrompita kanto*, tradukita de Kabe. . . . . » »
Perrault (Ch.). *Rakontoj pri Feinoj*, tradukitaj de Sinjorino Sarpy. 1 »
Rakontoj kaj Fabeloj (el Esperantaj Prozaĵoj). . . . . » 25
Sieroševski (Vaclav). *La Fundo de l'mizero*, tradukita de Kabe. . » 75
Virgilio. *Eneido*, kantoj I et II, tradukita de Dʳᵉ Vallienne. . . . » 60

(*Turnu.*)

1.50
~~221~~
B 31

CERCLE ESPERANTISTE
LYON
UNIVERSITAIRE

KOLEKTO ESPERANTA

APROBITA DE Dº ZAMENHOF

DON JUAN

AŬ

LA ŜTONA FESTENO

KVINAKTA KOMEDIO

DE MOLIÈRE (MOLJERO

1665

TRADUKIS

EMILE BOIRAC

Rektoro de la Dijona Universitato



FRANCUJO. — HACHETTE et Cie, *PARIS*.

ANGLUJO. — « REVIEW of REVIEWS », *LONDON*.
DANUJO. — ANDR.-FRED. HÖST & SÖN, *KJÖBENHAVN*
GERMANUJO. — MÖLLER & BOREL, *BERLIN*.
HISPANUJO. — J. ESPASA, *BARCELONA*.
ITALUJO. — RAFFAELLO GIUSTI, *LIVORNO*.
POLUJO. — M. ARCT, *WARSZAWA*.

PERSONOJ

Don Juan, filo de Don Luiz.
Sganarelo.
Elviro, amantino de Don Juan.
Gusmano, ĉevalestro de Elviro.
Don Karlos, Don Alonzo, } fratoj de Elviro.
Don Luiz, patro de Don Juan.
Francisko, malriĉulo.
Ĉarlino, Mateino } vilaĝaninoj.
Peĉjo, vilaĝano, amanto de Ĉarlino.
La Statuo de la Komandoro.
Lavioleto, Ragoteno, } servistoj de Don Juan.
S. Dimanĉo, komercisto.
Larameo, duelisto.
Sekvantaro de Don Juan.
Sekvantaro de Don Karlos kaj Don Alonzo, fratoj.
Fantomo.

La agado havas lokon en Sicilio.

DON JUAN

aŭ

LA ŜTONA FESTENO

AKTO UNUA

La teatro prezentas palacon.

SCENO UNUA

SGANARELO, GUSMANO

SGANARELO, tenante tabakujon.

Kion ajn povas diri Aristotelo kaj la tuta filozofaro, nenio egalvaloras la tabakon : ĝi estas la pasio de l'honestuloj, kaj kiu vivas sen tabako ne estas inda vivi. Ne sole ĝi gajigas kaj purigas la homajn cerbojn, sed ankaŭ ĝi instruas la animojn pri la virto, kaj oni lernas per ĝi fariĝi honestulo. Ĉu vi ne vidas ja, kiel serveme, tuj kiam oni uzas ĝin, oni agas kontraŭ ĉiuj, kaj kiel oni estas ravata doni da ĝi, dekstre kaj maldekstre, kie ajn oni troviĝas ? Eĉ oni ne atendas esti petita, kaj oni antaŭkuras la deziron de l'personoj ; tiel vere estas, ke la tabako inspiras sentojn de honoro kaj virto al ĉiuj ĝiaj uzantoj. Sed sufiĉe pri tiu temo : ni reprenu iom nian paroladon. Tiel do, kara Gusmano, sinjorino Elviro, via mastrino, surprizita de nia forveturo, ekmilitiris post nin ; kaj ŝia koro, kiun mia mastro sciis tro forte tuŝi, ne povis vivi, laŭ via diro, ne venante serĉi lin tie ĉi. Ĉu vi volas, ke

inter ni mi diru al vi mian penson ? Mi timas, ke ŝi estos malbone pagata por ŝia amo, ke ŝia vojaĝo en tiun ĉi urbon naskos malmulte da frukto, kaj ke vi estus tiom egale gajnintaj ne moviĝante de tie.

GUSMANO

Kaj la kaŭzo plie ? Diru, mi petas, Sganarelo, kio povas inspiri al vi tiel malbone antaŭsignan timon ? Ĉu via mastro malfermis al vi sian koron pri tio, kaj ĉu li diris al vi, ke li havas por ni ian malvarmecon, kiu lin devigis forveturi ?

SGANARELO

Ne, sed okulmezure, mi konas proksimume la iradon de l'aferoj, kaj, kvankam li ankoraŭ diris al mi nenion, mi preskaŭ vetus, ke l'afero iras tien. Mi povas eble erari, sed fine, pri tiaj temoj, la spertado povis doni al mi kelkajn lumojn.

GUSMANO

Kiel ? tiu forveturo tiel malmulte antaŭvidita estus malfidelaĵo de Don Juan ? Li povus fari tian ofendon al la ĉasta amo de Sinjorino Elviro ?

SGANARELO

Ne, sed li estas ankoraŭ juna, kaj ne havas sufiĉe da kuraĝo...

GUSMANO

Homo de lia rango farus tiel malkuraĝan faron !

SGANARELO

He ! jes, lia rango ! la rezono estas bela ; kaj pro tio li sin detenus de la aferoj !

GUSMANO

Sed la sanktaj ligiloj de la edzeco lin tenas endevigitan . . .

SGANARELO

He ! kompatinda Gusmano, amiko mia, vi ne scias ankoraŭ, kredu min, kia homo estas Don Juan.

GUSMANO

Mi ne scias, efektive, kia homo li povas esti, se estas vere, ke li faris al ni tian perfidaĵon ; kaj mi ne komprenas kiel, post tiom da amo kaj senpacienco elmontritaj, tiom da fervoraj amindumoj, da petoj, sopiroj kaj larmoj, tiom da pasiaj leteroj, kaj ripetitaj ĵuroj, tiom da elboloj fine kaj da eksplodoj, kiujn li aperigis, ĝis perforti en sia pasio la sanktan barilon de monaĥejo por meti sinjorinon Elviron en sian potencon ; mi ne komprenas, mi diras, kiel post ĉio tio ĉi li havus la koron esti kapabla malplenumi sian vorton.

SGANARELO

Mi ne havas grandan penon por ĝin kompreni, mi, kaj se vi konus la pilgrimanton, vi trovus la aferon sufiĉe facila por li. Mi ne diras, ke li ŝanĝis siajn sentojn por Sinjorino Elviro ; mi ne havas ankoraŭ certecon pri tio. Vi scias, ke laŭ lia ordono mi forveturis antaŭ li ; kaj de lia alveturo, li ankoraŭ ne interparolis kun mi ; sed antaŭzorge, mi sciigas vin, *inter nos,* ke vi vidas en Don Juan, mia mastro, la plej grandan krimegulon, kiun la tero iam portis, furiozulon, hundon, diablon, turkon, herezulon, kiu kredas nek ĉielon, nek sanktulon, nek Diọn, nek lupkoboldon, kiu pasigas tiun ĉi vivon kiel vere bruta besto, porkon de Epikuro, veran Sardanapalon, kiu fer-

mas la orelon al ĉiuj kristanaj admonoj, kiujn oni povas fari al li, kaj nomas sensencaĵoj ĉion, kion ni kredas. Vi diras al mi, ke li edziĝis je via mastrino : kredu, ke li estus farinta multe pli por kontentigi sian pasion, kaj ke kune kun ŝi li estus ankaŭ edziĝinta je vi, ŝia hundo, kaj ŝia kato. Edziĝo kostas al li nenion por kontrakti ; li ne uzas aliajn kaptilojn por kapti la belulinojn ; kaj li estas edziĝanto ĉiuflanka. Sinjorino, fraŭlino, urbanino, vilaĝanino, li trovas nenion tro varma nek tro malvarma por si ; kaj se mi dirus al vi la nomojn de ĉiuj virinoj, je kiuj li edziĝis en diversaj lokoj, estus ĉapitro daŭronta ĝis vespere. Vi restas surprizata, kaj alikoloriĝas ĉe tiu parolado : tio estas nur skizo de l'personaĵo ; kaj por fini la portreton, oni bezonus multe da plua penikado. Sufiĉas, ke la kolero de l'ĉielo nepre lin premegos iam, ke estus pli bone por mi aparteni al la diablo ol aparteni al li, kaj ke li vidigas al mi tiom da abomenaĵoj, ke mi dezirus, ke li estu jam, mi ne scias kie. Sed grandsinjoro malbonulo estas terura afero ; mi devas esti al li fidela, vole malvole ; timo faras en mi oficon de fervoro, kaj min tre ofte necesigas tion aplaŭdi, kion malamegas mia animo. Jen li estas, li venas promeni en tiu ĉi palaco, ni disiru. Aŭskultu almenaŭ ; mi faris al vi tiun konfidencion senkaŝe, kaj tio eliris el mia buŝo iom rapide ; sed se okazus, ke io el ĝi venus al liaj oreloj, mi dirus laŭte, ke vi mensogis.

SCENO II-a

DON JUAN, SGANARELO

DON JUAN

Kiu homo parolis kun ci tie ? Li havas ja la mienon, ŝajnas, de la bona Gusmano de Sinjorino Elviro.

SGANARELO

Estu io proksimume, kiel tio.

DON JUAN

Kio ! Estas li !

SGANARELO

Li mem !

DON JUAN

Kaj de kiam li estas en tiu ĉi urbo ?

SGANARELO

De hieraŭ vespere.

DON JUAN

Kaj kia kaŭzo lin venigas ?

SGANARELO

Mi pensas, ke vi komprenas sufiĉe, kio povas lin maltrankviligi.

DON JUAN

Nia forveturo, kredeble ?

SGANARELO

La bonulo estas tute ĉagrenita pro tio, kaj demandis min pri la kaŭzo.

DON JUAN

Kaj kian respondon ci faris ?

SGANARELO

Ke vi nenion diris al mi pri tio.

DON JUAN

Sed plie, kia estas cia penso pri tio ? Kion ci imagas pri tiu afero ?

SGANARELO

Mi ? Mi pensas, ne vin ofendante, ke vi havas ian novan amon en la kapo.

DON JUAN

Ĉu ci kredas ?

SGANARELO

Jes.

DON JUAN

Je mia fido , ci ne eraras, kaj mi devas konfesi al ci, ke alia objekto forpelis Elviron de mia penso.

SGANARELO

He ! Dio mia ! mi scias mian Don Juan'on parkere, kaj konas vian koron kiel la plej grandan vagiston en la mondo ; ĝi amas promeni de lokoj al lokoj, kaj ne tre plaĉas al ĝi restadi kie ajn.

DON JUAN

Kaj ĉu ci ne trovas, diru, ke mi estas prava agante tiamaniere ?

SGANARELO

He ! Sinjoro...

DON JUAN

Kio ! Parolu.

SGANARELO

Sendube, vi estas prava, se vi volas ; oni ne povas iri kontraŭ tio. Sed, se vi ne volus, estus eble alia afero.

DON JUAN

Nu, mi donas al ci la permeson paroli, kaj diri al mi ciajn sentojn.

SGANARELO

En tiu okazo, sinjoro, mi diros al vi senkaŝe, ke mi ne aprobas vian metodon, kaj trovas tre malbele ami ĉiuflanke, kiel vi faras.

DON JUAN

Kio ! Ci volas, ke oni sin devigu restadi ĉe l'unua objekto nin prenanta, ke oni forrifuzu la mondon por ĝi, kaj ke oni ne plu havu okulojn por kiu ajn ? Jen estas bela afero voli distingiĝi per la falsa honoro esti fidela, sin entombigi je eterne en unu pasio, kaj esti mortinta tuj de sia juneco por ĉiuj aliaj belaĵoj, kiuj povas frapi niajn okulojn ! Ne, ne, la konstanteco estas bona nur por ridinduloj ; ĉiuj belulinoj rajtas nin ĉarmi, kaj la supereco esti unue renkontita ne devas rabi de l'ceteraj la justajn pretendojn, kiujn ili havas ĉiuj sur niaj koroj. Miaparte la beleco min ravas, kie ajn mi ĝin trovas, kaj mi cedas facile al tiu dolĉa perforto, per kiu ĝi min forlogas. Kiom ajn mi estas endevigita, la amo, kiun mi havas por unu belulino, ne devigas mian animon fari maljustaĵon al la aliaj ; mi konservas okulojn por vidi la me-

riton de ĉiuj, kaj mi redonas al ĉiuj la amindumojn kaj oferdonojn, al kiuj nin trudas la naturo. Kio ajn ĝi estas, mi ne povas rifuzi mian koron al ĉio, kion mi vidas amindan ; kaj tuj kiam bela vizaĝo petas ĝin de mi, se mi havus dekmil, mi donus ilin ĉiujn. La naskiĝantaj inklinoj, sume, havas neklarigeblajn ĉarmojn, kaj la tuta plezuro de amo estas en la ŝanĝo. Oni ĝuas treegan dolĉecon subigante per cent amindumoj la koron de juna belulino, vidante, tago post tago, la progresetojn, kiujn oni faras en ĝi, batalante, per ekscitoj, per larmoj kaj ekĝemoj, la senkulpan hontemon de animo, kiu ŝanceliĝas fordoni la armilojn, perfortante piedo ĉe piedo ĉiujn malgrandajn barojn, kiujn ĝi kontraŭmetas, venkante la skrupulojn, el kiuj ĝi faras al si honoron, kaj ĝin dolĉe kondukante, kien ni deziras ĝin venigi. Sed kiam oni estas unu fojon mastro de ĝi, nenio plu estas por diri nek deziri ; la tuta belo de l'pasio estas finita, kaj ni ekdormas en la trankvileco de tia amo, se ia nova objekto ne revekas niajn dezirojn, kaj prezentas al nia koro la allogajn ĉarmojn de farota almilito. Fine nenio estas tiel dolĉa kiel triumfi la malcedon de bela persono ; kaj mi havas, pri tiu afero, la gloramon de la almilitantoj, kiuj flugas senĉese de venko al venko, kaj ne povas decidi mem la limigon de siaj deziroj. Nenio estas, kio povas haltigi la torentecon de miaj avidoj, mi sentas en mi koron por ami la tutan teron ; kaj same kiel Aleksandro, mi dezirus, ke estu aliaj mondoj por povi tien vastigi miajn amajn almilitojn.

SGANARELO

Je mia vivo ! Kiel vi elbuŝas ! Sajnas, kvazaŭ vi estus lerninta tion ĉi parkere, kaj vi parolas tute kiel libro.

DON JUAN

Kion ci havas por diri pri tio ?

SGANARELO

Je mia fido, mi havas por diri... Mi ne scias kion diri ; ĉar vi turnas la aferojn tiamaniere, ke ŝajnas, kvazaŭ vi estus prava ; kaj tamen estas vere, ke vi ne estas. Mi havis la kiel eble plej belajn pensojn, kaj viaj paroladoj konfuzis al mi ĉion tion ĉi. Lasu min fari ; alian fojon mi metos miajn argumentojn skriben, por disputi kun vi.

DON JUAN

Ci faros bone.

SGANARELO

Sed, Sinjoro, ĉu tio ne estus ekster la limoj de la permeso, kiun vi donis al mi, se mi dirus al vi, ke mi estas iomete maledifata de la vivo, kiun vi kondukas ?

DON JUAN

Kiel ! Kian vivon do mi kondukas ?

SGANARELO

Tre bonan. Sed ekzemple vidi vin ĉiumonate edziĝi, kiel vi faras...

DON JUAN

Ĉu estas io pli agrabla ?

SGANARELO

Estas vere. Mi komprenas, ke tio estas tre agrabla kaj tre amuza : kaj mi sufiĉe kontentiĝus per ĝi, se ne estus malbono ; sed, sinjoro, tiel moki sanktan misteron, kaj...

DON JUAN

Iru, iru, ĝi estas afero inter la ĉielo kaj mi, kaj ni bone malmiksos ĝin ambaŭ kune sen cia zorgado.

SGANARELO

Je mia fido, sinjoro, mi ĉiam aŭdis, ke estas malbona moko moki la ĉielon, kaj la liberkreduloj neniam faras bonan finon.

DON JUAN

Haltu ! majstro malspritulo ! Vi sciaŝ, ke mi diris al vi, ke mi ne amas la riproĉistojn.

SGANARELO

Tial mi ne parolas por vi, Dio min gardu ! vi ja scias, kion vi faras ; kaj, se vi kredas nenion, vi havas viajn pravojn ; sed estas iaj malgrandaj arogantuloj en la mondo, kiuj estas liberkreduloj, ne sciante kial, kiuj afektas esti liberspirituloj, tial ke ili kredas, ke tio al ili konvenas, kaj se mi havus mastron tielan, mi dirus al li tre klare, lin rigardante rekte en la vizaĝon : ĉu vi kuraĝas tiel moki la ĉielon, kaj ne tremas, ŝercante, kiel vi faras, pri la plej sanktaj aferoj ? Al vi ja, malgranda tervermo, al vi, malgranda mirmidono (mi parolas al la dirita mastro) al vi konvenas enmiksiĝi en tian entreprenon fari mokaĵon el tio, kion respektegas ĉiuj homoj ! Ĉu vi pensas, ke, ĉar vi estas altranga, havas blondan kaj bele frizitan perukon, plumojn sur via ĉapelo, veston tute orumitan, kaj rubandojn fajrkolorajn (ne vin mi alparolas, sed la alian) ; ĉu vi pensas, mi diras, ke vi estas pro tio pli lerta homo ; ke ĉio estas al vi permesata, kaj ke oni ne kuraĝas diri al vi viajn veraĵojn ? Eksciu de mi, kiu estas via servisto, ke la ĉielo punas pli malpli frue la malpiulojn, ke malbona vivo alkondukas malbonan morton, kaj ke...

DON JUAN

Pacon !

SGANARELO

Pri kio estas la afero ?

DON JUAN

La afero estas diri al ci, ke belulino tenas min ĉe la koro, kaj ke altirita de ŝiaj ĉarmoj mi sekvis ŝin ĝis en tiun ĉi urbon.

SGANARELO

Kaj ĉu vi nenion timas tie ĉi pro la morto de tiu Komandoro, kiun vi mortigis antaŭ ses monatoj ?

DON JUAN

Kaj kial timi ? Ĉu mi ne bone mortigis lin ?

SGANARELO

Tre bone, kiel eble plej bone, kaj li estus malprava plendante.

DON JUAN

Mi havis mian kviton en tiu afero.

SGANARELO

Jes, sed tiu kvito ne estingas eble la venĝemon de la parencoj kaj amikoj ; kaj...

DON JUAN

Ha ! ni ne pripensu la malbonon, kiu povas okazi al ni, kaj ni pripensu sole tion, kio povas doni al ni plezuron. La persono, pri kiu mi parolas, estas juna fianĉino, la plej agrabla en la mondo, kiu estas kondukita tien ĉi de tiu mem, je kiu ŝi volas edziniĝi, kaj la okazo vidigis al mi tiun paron da geamantoj tri-kvar tagojn antaŭ ilia vojaĝo. Neniam mi vidis du personojn esti tiel kontentaj unu pri la alia, kaj aperigi tiom da amo. La

videbla fervoro de ilia reciproka pasio donis al mi eksciton ; mi estis korfrapita kaj mia amo komenciĝis per ĵaluzeco. Jes, mi ne povis elporti vidante ilin tiel bone unu kun la alia ; la malkontento ekbruligis miajn dezirojn, kaj mi imagis al mi treegan plezuron, se mi povus konfuzi ilian konsenton kaj rompi tiun ligon, pro kiu sin juĝis ofendita la delikateco de mia koro ; sed ĝis nun ĉiuj miaj penoj estis senutilaj, kaj mi min turnas al la lasta rimedo. Tiu estonta edzo estas hodiaŭ regalonta sian amatinon per marpromeno. Nenion dirinte al ci pri tio, mi ĉion preparigis por kontentigi mian amon, kaj mi havas malgrandan barkon, kaj homojn, per kio tre facile mi pretendas forrabi la belulinon.

SGANARELO

Ha ! sinjoro !...

DON JUAN

Hem ?

SGANARELO

Tio estas tre bone farita de vi, kaj vi prenas tion, kiel decas. Nenio estas tia en tiu ĉi mondo, kiel sin kontentigi.

DON JUAN

Preparu do cin por veni kun mi, kaj zorgu mem kunporti ĉiujn miajn armilojn, por ke... *(Ekvidante Sinjorinon Elviron).* Ha! bedaŭrinda renkontiĝo! Perfidulo ! ci ne diris al mi, ke ŝi estas mem tie ĉi.

SGANARELO

Sinjoro, vi ne demandis min pri tio.

DON JUAN

Ĉu ŝi estas freneza ne ŝanĝinte sian veston, kaj venante en tiun ĉi lokon kun sia kampara aranĝaĵo ?

SCENO III-a

SINJORINO ELVIRO, DON JUAN, SGANARELO

SINJORINO ELVIRO

Ĉu vi faros al mi la favoron, Don Juan, bonvoli min rekoni ? Kaj ĉu mi povas almenaŭ esperi, ke vi ŝatos turni la vizaĝon al tiu ĉi flanko ?

DON JUAN

Sinjorino, mi konfesas, ke mi estas surprizata, kaj ke mi ne atendis vin tie ĉi.

SINJORINO ELVIRO

Jes, mi vidas bone, ke vi ne atendis min, kaj vi estas surprizata, efektive, sed tute alie ol kiel mi esperis ; kaj la maniero, laŭ kiu vi aperas tia, plene konvinkas min pri tio, kion mi rifuzis kredi. Mi admiras mian simplecon kaj la malfortecon de mia koro, kiu dubis pri perfido, kiun certigas al mi tiom multe da aperoj. Mi estis sufiĉe bona, mi konfesas, aŭ pli ĝuste sufiĉe malsaĝa por voli min trompi mem, kaj penadi por kontraŭdiri miajn okulojn kaj mian prudenton. Mi serĉis pravojn por senkulpigi antaŭ mia fervoro la malstreĉiĝon de amikeco, kiun ĝi vidis en vi ; kaj mi forĝis al mi intence cent rajtajn kaŭzojn de tiel akcelegita forveturo, por vin pravigi pri la krimo, pri kiu kulpigis vin mia saĝo. Kiom ajn parolis al mi miaj justaj suspektoj, mi forĵetis ilian voĉon, kiu faris vin krima antaŭ miaj okuloj, kaj mi aŭskultis plezure mil ridindajn iluziaĵojn, kiuj pentris vin senkulpa al mia koro ; sed fine tiu ĉi akcepto ne ebligas min dubi

plue ; kaj la ekrigardo, kiu min akceptis, sciigas al mi multe pli da aferoj, ol mi volis scii. Mi estus tamen tre kontenta aŭdi el via buŝo la kaŭzojn de via forveturo. Parolu do, Don Juan, mi petas, kaj mi vidu, kun kia mieno vi scios vin pravigi.

DON JUAN

Sinjorino, jen estas Sganarelo, kiu scias, kial mi forveturis.

SGANARELO, mallaŭte al Don Juan.

Mi, sinjoro ? Mi scias nenion pri tio, se plaĉas.

SINJORINO ELVIRO

Nu, Sganarelo, parolu. Tute egale, el kia buŝo mi aŭdos tiujn kaŭzojn.

DON JUAN, signante al Sganarelo, ke li alproksimiĝu.

Iru, parolu do al la sinjorino.

SGANARELO, mallaŭte al Don Juan.

Kion vi volas, ke mi diru ?

SINJORINO ELVIRO

Alproksimiĝu, Sganarelo, ĉar oni tiel volas, kaj diru al mi iom la kaŭzojn de tiel akcelita forveturo.

DON JUAN

Ĉu ci ne respondos ?

SGANARELO, mallaŭte al Don Juan.

Mi havas nenion por respondi. Vi mokas vian serviston.

DON JUAN

Ĉu ci volas respondi, mi diras ?

SGANARELO

Sinjorino...

SINJORINO ELVIRO

Kion ?

SGANARELO, sin turnante al sia mastro

Sinjoro...

DON JUAN, lin minacante.

Se...

SGANARELO

Sinjorino, la almilitantoj, Aleksandro, kaj la aliaj mondoj estas kaŭzo de nia forveturo. Jen, sinjoro, ĉio, kion mi povas diri.

SINJORINO ELVIRO

Ĉu vi volos, Don Juan, klarigi al mi tiujn belajn misterojn ?

DON JUAN

Sinjorino, por diri al vi la veron...

SINJORINO ELVIRO

Ha ! kiel malbone vi scias vin defendi, kvankam estante kortegano kaj kredeble kutimigita al tiaspecaj aferoj ! Mi vin kompatas vidante, en kia konfuzo vi estas. Kial vi ne armas vian frunton per nobla senhonteco ? Kial vi ne ĵuras, ke vi estas ĉiam en la samaj sentoj kontraŭ mi, ke vi ĉiam amas min kun senegala fervoro ? Kial vi ne diras al mi, ke aferoj de treega graveco vin devigis forveturi ne donante al mi averton pri tio ; ke vi bezonas, kontraŭvole, resti tie ĉi kelke da tempo, kaj ke mi devas nur reveni tien, de kie mi venas, certa ke vi sekvos miajn paŝojn kiel eble plej baldaŭ ; ke estas sen-

dube, ke vi avidas rekuniĝi kun mi, kaj ke malproksime de mi vi suferas, kion suferas korpo senigita de sia animo ? Jen kiamaniere vi devas vin defendi, kaj ne esti konfuzata, kiel vi estas.

DON JUAN

Mi konfesas, sinjorino, ke mi ne havas la talenton hipokriti, kaj ke mi portas koron sinceran. Mi ne diros al vi, ke mi estas ĉiam en la samaj sentoj kontraŭ vi, kaj ke mi avidas rekuniĝi kun vi, ĉar fine estas certe, ke mi forveturis nur por vin forkuri, ne pro la kaŭzoj, kiujn vi povas imagi, sed pro simpla motivo de konscienco, kaj pro la kredo, ke mi ne povus plue vivadi kun vi sen peko. Venis al mi skrupuloj, sinjorino, kaj mi malfermis la okulojn de mia animo antaŭ mia faro. Mi pripensis, ke, por edziĝi je vi, mi vin forŝtelis de la barilo de monahejo, ke vi rompis promesojn, kiuj vin ligis aliparte, kaj ke la ĉielo tre ĵaluzas pri tiaspecaj aferoj. La pento min prenis, kaj mi timis la ĉielan koleron. Mi kredis, ke nia edziĝo estas nur alivestita adulto, ke ĝi altiros al ni ian malfavoron de supre, kaj ke fine mi devas provi vin forgesi kaj doni al vi rimedon por reiri al viaj unuaj ĉenoj. Ĉu vi volus, sinjorino, kontraŭstari al tiel sankta penso ? kaj ke mi riskus, vin retenante, havi malpacon kun la ĉielo ? Ke por...

SINJORINO ELVIRO

Ha ! krimegulo, nun ja mi konas cin tutan ; kaj por mia malfeliĉo, mi cin konas, kiam ne estas plu tempo, kaj kiam tia kono ne povas plu utili al mi krom por min malesperigi ; sed sciu, ke cia krimo ne restos senpuna,

kaj ke la sama ĉielo, kiun ci mokas, scios min venĝi por cia perfido !

DON JUAN

Sganarelo, la ĉielo !

SGANARELO

Vere jes, ni tre mokas ĉi tion, ni !

DON JUAN

Sinjorino...

SINJORINO ELVIRO

Sufiĉas. Mi ne volas aŭdi plue, kaj mi kulpigas min, ke mi tro longe aŭdis. Estas malkuraĝe peti tro da klarigoj pri sia hontigo, kaj en tiaj aferoj nobla koro ĉe l'unua vorto devas preni sian decidon. Ne atendu, ke mi eksplodos tie ĉi en riproĉojn kaj insultojn ; ne, ne, mi ne havas koleron por elspiri per vanaj vortoj ; kaj ĝia tuta fajreco sin rezervas por la venĝo. Mi ree diras al ci, la ĉielo cin punos, perfidulo, pro l'ofendo kiun ci faras al mi ; kaj se la ĉielo havas nenion, kion ci povas timi, timu almenaŭ la koleron de ofendita virino !

SCENO IV-a

DON JUAN, SGANARELO

SGANARELO, flanken.

Se la pento povus lin preni !

DON JUAN, post momento de pripensado.

Ni iru pripensi l'efektivigon de nia ama entrepreno.

SGANARELO, sola.

Ha ! Kian abomindan mastron mi estas devigata servi !

AKTO DUA

La teatro prezentas kamparon sur la marbordo.

SCENO UNUA

ĈARLINO, PEĈJO

ĈARLINO

Vere, Peĉjo, ci troviĝis tie tre ĝustatempe.

PEĈJO

Je Dio, mankis nur dikeco de pinglo, por ke ili dronu ambaŭ.

ĈARLINO

Ĉu do la blovado hodiaŭmatena ilin renversis en la maron ?

PEĈJO

Nu do, Ĉarlino, mi tuj rakontos al ci tute rekte, kiamaniere tio okazis ; ĉar, kiel diris la alia, mi ilin ekvidis unua, unua mi ekvidis ilin. Fine do, mi estis sur la marbordo, kune kun la dika Lukaso, kaj ni amuziĝis petolante per terbuloj, kiujn ni ĵetis al la kapo unu de la alia; ĉar, kiel ci bone scias, la dika Lukaso amas petoli; kaj mi, iafoje, petolas ankaŭ. Petolante do, se tio estas

petoli, mi ekvidis de tie malproksime ion, kio svingis en la akvo, kaj kiu venis kvazaŭ al ni per skuo. Mi vidis tion videble, kaj poste subite mi vidis, ke mi vidas plu nenion. He Lukaso ! mi diris, mi pensas, ke jen estas homoj naĝantaj tie malproksime. Vere, li diris, ci ĉeestis al la mortiĝo de kato, ci havas la vidon malklara. Sangon de Dio, mi diris, mi ne havas la vidon malklara : ĝi estas homoj. — Tute ne, li diris, ci havas malvidecon. — Cu ci volas veti, mi diris, ke mi ne havas malvidecon, mi diris, kaj ke ĝi estas du homoj, kiuj naĝas rekte tien ĉi, mi diris. — Morton de Dio, li diris, mi vetas, ke ne. — Ho ! mi diris, ĉu ci volas veti dek soldojn, ke jes ? — Mi tute volas, li diris, kaj por ĝin montri al ci, jen estas mono kiel garantiaĵo, li diris. — Mi ja ne estis freneza nek sencerba: mi brave metis teren kvar monerojn kaj kvin soldojn, je Dio, tiel kuraĝe kiel se mi englutus glason da vino; ĉar mi estas ja riskema kaj agadas laŭ mia bontrovo. — Mi bone sciis kion mi faris. Iu alia naivegulo ! Fine do, apenaŭ mi estis ekvetinta, mi vidis la du homojn, tute videble, kiuj faris al ni signojn, ke ni iru al ili ; kaj mi unue forprenis la garantiaĵon. — Nu, Lukaso, mi diris, ci vidas bone, ke ili nin vokas ; ni iru rapide por ilin helpi. — Ne, li diris, ili igis min malgajni. — Ho do ! tiel estas. ke fine, por mallongigi, mi tiel predikis al li, ke ni nin metis en barkon, kaj poste ni tiom klopodis bone malbone, ke ni tiris ilin el la akvo, kaj poste ni kondukis ilin al nia domo apud la fajro ; kaj poste ili sin senvestigis tute nudaj por sin sekigi, kaj poste venis ankoraŭ du el la sama bando, kiuj sin savis tute solaj, kaj poste Mateino tien alvenis, al kiu oni faris amindumajn okuladojn. Jen estas ĝuste, Ĉarlino, kiel ĉio tio ĉi okazis.

ĈARLINO

Ĉu ci ne diris al mi, Peĉjo, ke unu estas multe pli beltalia ol ceteraj ?

PEĈJO

Jes, li estas la mastro. Kredeble li estas ia granda, granda sinjoro, ĉar li havas oron sur sia vesto de supre ĝis malsupre ; kaj liaj servantoj estas mem sinjoroj ; kaj tamen kiom ajn granda sinjoro li estas, li droniĝus, je mia fido, se mi ne ĉeestus tie.

ĈARLINO

Vidu iom !

PEĈJO

Ho ! je Dio, sen mi li havus sian plenbuŝelon da faboj.

ĈARLINO

Ĉu li estas ankoraŭ tute nuda ĉe ci, Peĉjo ?

PEĈJO

Ne, ili envestigis lin tute antaŭ ni. Dio mia ! mi neniam vidis iun tiel envestiĝi. Kiom da aferaĵoj kaj ornamaĵoj surmetas sur sin tiuj sinjoroj korteganoj ! Mi perdiĝus en ĉio tio ĉi, kaj mi estis tute mirigata, vidante ĝin. Nu, Ĉarlino, ili havas harojn, kiuj ne teniĝas ĉe ilia kapo ; kaj tion ili surmetas post ĉio, kvazaŭ kufon el stupo. Ili havas ĉemizojn, kiuj havas manikojn, en kiujn ni enirus tute starante, ci kaj mi. Anstataŭ pantaloneto, ili portas jupeton tiom larĝan kiom de nun ĝis Pasko ; anstataŭ jako, malgrandan brakveston, kiu ne atingas eĉ ilian brustoston, kaj anstataŭ kolumo, grandan poŝtukon el retaĵo, kun kvar dikaj penikoj el tolaĵo, kiuj pendas sur ilia stomako. Ili havas ankaŭ aliajn kolume-

tojn ĉe la fino de l'brakoj kaj grandajn funelojn el pasamento ĉe la kruroj ; kaj inter ĉio tio ĉi, tiom da rubandoj, tiom da rubandoj, ke ĝi estas vere kompato ! Eĉ la ŝuoj estas surtegitaj de rubandoj, kaj ili estas faritaj tiamaniere, ke mi rompus per ili mian kolon.

ĈARLINO

Je mia fido, Peĉjo, mi devas iri vidi ĉion tion ĉi.

PEĈJO

Ho ! aŭskultu iom antaŭe, Ĉarlino. Mi havas ion alian por diri al ci.

ĈARLINO

Nu, diru, kio ĝi estas ?

PEĈJO

Vidu, Ĉarlino, estas necese, kiel diras la alia, ke mi malŝtopu mian koron. Mi amas cin, ci bone scias, kaj ni estas edziĝontaj kune, sed je Dio, mi ne estas kontenta pri ci.

ĈARLINO

Kiel do ? Kio estas ?

PEĈJO

Estas, ke ci ĉagrenas mian spiriton, senkaŝe.

ĈARLINO

Kaj kiamaniere ?

PEĈJO

Kapon de Dio ! ci ne amas min.

ĈARLINO

Ha ! ha ! ĉu estas nur tio ?

PEĈJO

Jes, estas nur tio, kaj estas ja sufiĉe.

ĈARLINO

Dio mia, Peĉjo, ci venas ĉiam diri al mi la samon.

PEĈJO

Mi diras ĉiam al ci la samon, ĉar ĝi estas ĉiam la samo ; kaj se ĝi ne estus ĉiam la samo, mi ne dirus ĉiam al ci la samon.

ĈARLINO

Sed kion ci bezonas ? Kion ci volas ?

PEĈJO

For Dio ! mi volas, ke ci amu min.

ĈARLINO

Ĉu mi cin ne amas ?

PEĈJO

Ne, ci ne amas min ; kaj tamen mi faras ĉion, kion mi povas por tio. Mi aĉetas por ci, senriproĉe, rubandojn de ĉiuj trairantaj pasamentistoj ; mi rompas al mi la kolon elnestigante merlojn por ci ; mi igas ludi por ci violonistojn, kiam okazas cia festotago ; kaj ĉion tion ĉi, kvazaŭ mi batus mian kapon kontraŭ muro. Vidu, tio ne estas bela nek honesta ne ami tiujn, kiuj nin amas.

ĈARLINO

Sed, Dio mia ! mi amas cin ankaŭ.

PEĈJO

Jes, ci amas min belmaniere !

ĈARLINO

Kiel do ci volas, ke mi faru ?

PEĈJO

Mi volas, ke ci tiel faru, kiel oni faras, kiam oni tiel amas, kiel oni devas.

ĈARLINO

Ĉu mi ne amas cin tiel ankaŭ, kiel oni devas ?

PEĈJO

Ne. Kiam tio estas, tio vidiĝas, kaj oni faras mil simiaĵojn al la personoj, kiam oni amas ilin bonkore. Rigardu la dikan Tomasinon, kiel ŝi malsaĝas pri la juna Robeno : ŝi estas ĉiam ĉirkaŭ li por lin inciteti, kaj neniam lasas lin ripoze. Ĉiam ŝi faras al li ian ŝercaĵon, aŭ donas al li ian bateton pasante ; kaj unu tagon, kiam li estis sidanta sur skabelo, ŝi subite ŝovis ĝin el sub li, kaj faligis lin, kiel longa li estas, teren. Je Dio, jen kiamaniere oni vidas la amantojn; sed ci ja, ci diras neniam vorton, ci estas ĉiam kvazaŭ vera lignoŝtipo; kaj eĉ se mi pasus dudekfoje antaŭ ci, ci ne ekmoviĝus por doni al mi la plej malgrandan baton aŭ diri al mi la plej malgrandan aferon. Ventron de Dio ! tio ne estas bona, malgraŭ ĉio ; kaj ci estas tro malvarma por la personoj .

ĈARLINO

Kion ci volas, ke mi faru ? Mia humoro estas tia kaj mi ne povas min refandi.

PEĈJO

Kia ajn estas la humoro, tute egale. Kiam oni sentas amikecon por la personoj, oni ĉiam donas kelkan signeton de ĝi.

ĈARLINO

Fine, mi cin amas tiom multe, kiom mi povas, kaj se ci ne estas kontenta pri tio, ci devas nur ami iun alian.

PEĈJO

Nu, jen estas mia konto ! Kapon de Dio ! se ci amus min, ĉu ci dirus tion al mi ?

ĈARLINO

Kial do ci venas turmenti al mi la spiriton ?

PEĈJO

Morton de Dio ! kian malbonon mi faras al ci ? Mi petas nur iom da amikeco.

ĈARLINO

Nu, lasu dó fari, kaj ne premu min tiel forte. Eble tio venos subite ne pripensante.

PEĈJO, etendante la manon.

Tuŝu do tie, Carlino.

ĈARLINO, donante la manon.

Nu, tenu.

PEĈJO

Promesu do al mi, ke ci penos min plimulte ami.

ĈARLINO

Mi faros ĉion, kion mi povos por tio ; sed tio devas fariĝi propramove. Peĉjo, ĉu jen estas tiu sinjoro ?

PEĈJO

Jes, jen li estas.

ĈARLINO

Ha ! Dio mia ! kiel ĉarma li estas, kaj kiel domaĝe estus, se li dronus !

PEĈJO

Mi revenos tuj ; mi iras trinki botelon da vino por min rebonigi iom post la laciĝo, kiun mi havis.

SCENO II-a

DON JUAN, SGANARELO, ĈARLINO

sur la fundo de l' teatro.

DON JUAN

Ni maltrafis nian aferon, Sganarelo, kaj tiu neantaŭvidita blovado renversis kune kun nia barko la projekton, kiun ni faris ; sed ,por diri vere, la vilaĝanino, kiun mi ĵus lasas, kompensas mian malfeliĉon, kaj mi trovis en ŝi ĉarmojn, kiuj forigas el mia spirito la ĉagrenon, kiun donis al mi la malsukceso de mia entrepreno. Ne devas tiu koro sin forsavi de mi, kaj mi ĵetis jam en ĝin disponojn por ne elporti longatempe, ke mi puŝos ekĝemojn.

SGANARELO

Sinjoro, mi konfesas, ke vi mirigas min. Apenaŭ ni forsavis nin el morta danĝero, kaj anstataŭ danki la ĉielon por la kompato, kiun ĝi bonvolis havi por ni, vi laboras tute denove por altiri ĝian koleron per viaj kutimaj fantaziaĵoj, kaj viaj amoj kri... *(Don Juan prenas minacan mienon.)* Silentu, vi fripono, vi ne scias, kion vi diras, kaj lia Moŝto scias, kion li faras. Ni iru.

DON JUAN, ekvidante Ĉarlinon.

Ha ! ha ! de kie eliras tiu ĉi alia vilaĝanino, Sganarelo ? Ĉu ci iam vidis ion pli beletan ? Kaj ĉu ci ne trovas, diru al mi, ke tiu ĉi egalvaloras la alian ?

SGANARELO

Certe *(flanken)* Alia peco nova.

DON JUAN, al Ĉarlino.

De kie venas al mi, belulino, tiel agrabla renkonto ? Kiel ! en tiuj kamparaj lokoj, inter tiuj arboj kaj ŝtonegoj, oni trovas personojn faritajn, kiel vi estas.

ĈARLINO

Vi vidas, sinjoro.

DON JUAN

Ĉu vi estas el tiu ĉi vilaĝo ?

ĈARLINO

Jes, sinjoro.

DON JUAN

Kaj ĉu vi loĝas en ĝi ?

ĈARLINO

Jes, sinjoro.

DON JUAN

Via nomo estas... ?

ĈARLINO

Ĉarlino, por vin servi.

DON JUAN

Ha ! kiel bela persono, kaj kiel penetremaj estas ŝiaj okuloj !

ĈARLINO

Sinjoro, vi faras min tute hontanta.

DON JUAN

Ha ! ne hontu aŭdi pri vi verajojn. Sganarelo, kion ci diras ? Ĉu oni povas vidi ion pli agrablan ? Turnu vin iom, se plaĉas. Ha ! Kiel beleta estas tiu talio ! Altigu iom la kapon, per favoro. Ha ! kiel ĉarma estas tiu vizaĝo ! Malfermu viajn okulojn tute. Ha ! kiel belaj ili

estas ! Mi vidu iom viajn dentojn, mi petas. Ha ! kiel amaj ili estas, kaj tiuj lipoj dezirigaj ! Miaparte, mi estas ravata, kaj neniam vidis tiel ĉarman personon.

ĈARLINO

Sinjoro, tion plaĉas al vi diri, kaj mi ne scias, ĉu ĝi estas por min moki.

DON JUAN

Mi, moki vin ! Dio min gardu ! Mi tro amas vin por tio, kaj el la fundo de l'koro mi parolas al vi.

ĈARLINO

Mi estas al vi tre danka, se tiel estas.

DON JUAN

Tute ne, vi ne devas esti danka al mi pro ĉio, kion mi diras al vi ; kaj nur al via beleco vi ĝin ŝuldas.

ĈARLINO

Sinjoro, ĉio tio ĉi estas tro bone dirita por mi, kaj mi ne havas spriton, por respondi al vi.

DON JUAN

Sganarelo, rigardu iom ŝiajn manojn.

ĈARLINO

Fi ! sinjoro ! ili estas nigraj, kiel mi ne scias kio.

DON JUAN

Ha ! kion vi diras ? Ili estas la plej belaj, kiujn oni povas vidi : permesu, ke mi kisu ilin, mi petas.

ĈARLINO

Sinjoro, tro da honoro vi faras al mi ; kaj se mi scius tion antaŭe, mi ne forgesus ilin lavi per brano.

DON JUAN

He ! diru iom al mi, bela Ĉarlino, vi ne estas edzinĝita, kredeble ?

ĈARLINO

Ne, sinjoro, sed mi estas baldaŭ edzinigota kun Peĉjo, la filo de najbarino Simonjo.

DON JUAN

Kio ! Tia persono, kiel vi, estus edzino de simpla vilaĝano ! Ne, ne, tio estus profani tiom da belaĵoj, kaj vi ne estas naskita por resti en vilaĝo. Vi meritas, sendube, pli bonan sorton ; kaj la ĉielo, kiu tion bone scias, min kondukis tien ĉi intence por malhelpi tiun edziĝon, kaj fari justecon al viaj ĉarmoj ; ĉar fine, bela Ĉarlino, mi vin amas el mia tuta koro ; kaj nur de vi dependos, ke mi vin fortiru el tiu mizera loko, kaj metu vin en la staton, kie vi meritas esti. Tiu amo estas tre rapida, sendube ; sed kio ! ĝi estas efiko, Ĉarlino, de via granda beleco, kaj oni amas vin post unu kvarono da horo egale, kiel oni amus iun alian post ses monatoj.

ĈARLINO

Tute vere, sinjoro, mi ne scias, kiel fari, kiam vi parolas. Tio, kion vi diras al mi, faras min ĝoja, kaj mi havus ĉiujn dezirojn vin kredi ; sed oni diris ĉiam al mi, ke neniam kredindaj estas la sinjoroj, kaj ke vi korteganoj estas ensorĉantoj, kiuj pripensas nur trompi la knabinojn.

DON JUAN

Mi ne estas el tiuj homoj.

SGANARELO, flanken.

Tute ne.

ĈARLINO

Vidu, sinjoro, ne estas plezuro trompiĝi. Mi estas malriĉa vilaĝanino ; sed mi havas la honoron en atento, kaj mi pli volus vidi min sen vivo ol sen honoro.

DON JUAN

Mi, ĉu mi havus animon sufiĉe malbonan por trompi tian personon kiel vi ? Ĉu mi estus sufiĉe malnobla por vin senhonorigi ? Ne, ne, mi havas tro da konscienco por tio. Mi vin amas, Ĉarlino, laŭ tuta virto kaj tuta honoro ; kaj por montri al vi, ke mi diras vere, sciu, ke mi ne havas alian intencon, krom edziĝi kun vi. Ĉu vi volas pli grandan ateston ? Jen mi estas preta, kiam vi volos ; kaj mi prenas la homon jenan kiel atestanton de la vorto, kiun mi donas al vi.

SGANARELO

Ne, ne timu. Li edziĝos kun vi tiel ofte, kiel vi volos.

DON JUAN

Ha ! Ĉarlino, mi vidas ja, ke vi ne konas min ankoraŭ. Vi estas maljusta kontraŭ mi, juĝante pri mi laŭ pri la ceteraj ; kaj se estas artifikuloj en la mondo, homoj kiuj celas nur trompi la knabinojn, vi devas tiri min el la nombro, kaj ne dubi pri la sincereco de mia amo ; kaj cetere via beleco vin certigas pri ĉio. Kiam oni estas farita, kiel vi estas, oni devas esti ŝirmata kontraŭ ĉiuj timoj tiaspecaj ; vi ne havas la mienon, kredu min, de persono trompebla, kaj miaflanke, mi konfesas al vi, mi traborus al mi la koron per mil batoj, se mi havus la plej malgrandan penson vin perfidi.

ĈARLINO

Dio mia ! mi ne scias, ĉu vi diras vere aŭ ne, sed vi faras, ke oni kredas vin.

DON JUAN

Kiam vi kredos min, vi certe faros justaĵon al mi ; kaj mi ripetas ankoraŭ la promeson, kiun mi faris. Ĉu vi ne akceptas ĝin ? Kaj ĉu vi ne volas konsenti esti mia edzino ?

ĈARLINO

Jes, se nur mia onklino volos.

DON JUAN, etendante la manon.

Tuŝu do, Ĉarlino, ĉar vi volas viaflanke.

ĈARLINO

Sed, almenaŭ, sinjoro, ne trompu min, mi petas ! Estus afero de konscienco por vi, kaj vi vidas, kiel mi agas bonfide.

DON JUAN

Kiel ! Ŝajnas, kvazaŭ vi dubus ankoraŭ pri mia sincereco ! Ĉu vi volas, ke mi faru terurajn ĵurojn ? Je la ĉielo...

ĈARLINO

Dio mia ! ne ĵuru ! mi vin kredas.

DON JUAN

Donu al mi kiseton, kiel garantiaĵon de via vorto.

ĈARLINO

Ho ! sinjoro, atendu, ĝis ni estos edzigitaj, mi petas. Post tio mi kisos vin, tiel ofte, kiel vi volos.

DON JUAN

Nu, bela Ĉarlino, mi volas ĉion, kion vi volas ; fordonu sole al mi vian manon, kaj permesu, ke per mil kisoj mi esprimu al ĝi la ravon, en kiu mi estas...

SCENO II-a

DON JUAN, SGANARELO, PEĈJO, ĈARLINO

PEĈJO, puŝante Don Juanon, kiu kisas la manon de Ĉarlino.

Kviete, sinjoro ; tenu vin, mi petas. Vi tro forte varmiĝas, kaj vi povus akiri pleŭrezion.

DON JUAN, repuŝante fortege Peĉjon.

Kiu alkondukas al mi tiun malrespektulon ?

PEĈJO, metante sin inter Don Juan kaj Ĉarlino.

Mi diras al vi, ke vi tenu vin, kaj ne karesu niajn fianĉinojn.

DON JUAN, repuŝante ankoraŭ Peĉjon.

Ha ! kiom da bruo !

PEĈJO

For Dio ! ne tiamaniere oni devas puŝi la personojn.

ĈARLINO, prenante Peĉjon je la brako.

Ha ! lasu do lin fari, Peĉjo !

PEĈJO

Kiel ! ke mi lasu lin fari ! Mi ne volas, mi.

DON JUAN

Ha !

PEĈJO

Kapon de Dio ! tial ke vi estas sinjoro, vi venos karesi niajn edzinojn antaŭ nia barbo ? Iru karesi viajn.

DON JUAN

Hem !

PEĈJO

Hem ! *(Don Juan donas al li survangon).* Kapon de Dio ! ne min frapu. *(alia survango)* Ho ! for Dio *(alia survango)* Ventron de Dio ! *(alia survango)* Sangon de Dio ! Morton de Dio ! ĝi ne estas bone, bati la personojn, kaj tio ne estas rekompenco, ke mi vin savis de la drono.

ĈARLINO

Peĉjo, ne ekkoleru.

PEĈJO

Mi volas ekkoleri, kaj ci estas malĝentilulino tolerante, ke oni cin amindumas.

ĈARLINO

Ho ! Peĉjo ! tio ne estas, kion ci pensas. Tiu ĉi sinjoro volas edziĝi kun mi, kaj ci ne devas ekkoleri.

PEĈJO

Kiel ! For Dio ! Ci estas fianĉigita je mi.

ĈARLINO

Tio nenion signifas, Peĉjo. Se ci min amas, ĉu ci ne devas esti tre kontenta, ke mi fariĝos sinjorino ?

PEĈJO

For Dio ! ne. Mi pli amas vidi cin krevintan ol apartenantan al alia viro.

ĈARLINO

Iru, iru, Peĉjo, ne maltrankviliĝu. Se mi estos sinjorino, mi faros, ke ci gajnos ion, kaj ci alportados buteron kaj fromaĝon al nia hejmo.

PEĈJO

Ventron de Dio ! Mi alportos nenion. eĉ se ci pagus duoble. Ĉu tiamaniere ci aŭskultas tion, kion oni diras al ci ? Morton de Dio ! se mi scius tion antaŭe, mi min gardus ja lin fortiri el l'akvo, kaj donus al li bonan baton per remilo sur la kapon.

DON JUAN, alproksimiĝante por lin bati.

Kion vi diras ?

PEĈJO, sin metante post Ĉarlinon.

Mi timas nenion.

DON JUAN, pasante al la flanko, kie estas Peĉjo.

Atendu min ion.

PEĈJO, repasante al la alia flanko.

Mi mokas ĉion, mi.

DON JUAN, kurante post Peĉjon

Ni vidu tion.

PEĈJO, forkurante ankoraŭ post Ĉarlinon.

Mi vidis ja multajn aliajn aferojn.

DON JUAN

Kiel do ?

SGANARELO

He ! Sinjoro, lasu tiun malfeliĉan mizerulon. Estas konscienco lin bati. *(Al Peĉjo, sin metante inter li kaj Don Juan.)* Aŭskultu, malfeliĉa knabo, deiru kaj nenion diru al li.

PEĈJO, pasante antaŭ Sganarelo kaj rigardante fiere Don Juanon.

Mi volas diri al li, mi.

DON JUAN, levante la manon por doni survangon al Peĉjo.

Ha ! mi vin instruos... *(Peĉjo mallevas la kapon, kaj Sganarelo ricevas la survangon.)*

SGANARELO, rigardante Peĉjon.

La peston por la malspritulo !

DON JUAN, al Sganarelo.

Jen ci estas pagata por cia bonfaro.

PEĈJO

For Dio ! Mi iras diri al ŝia onklino ĉiun tiun ĉi mastrumadon.

SCENO IV-a

DON JUAN, ĈARLINO, SGANARELO

DON JUAN, al Ĉarlino.

Fine, mi baldaŭ estos la plej feliĉa el ĉiuj homoj, kaj mi ne ŝanĝus mian feliĉon kontraŭ ĉiuj aferoj en la mondo. Kiom da plezuroj, kiam vi estos mia edzino, kaj kiam...

SCENO V-a

DON JUAN, MATEINO, ĈARLINO, SGANARELO

SGANARELO, ekvidante Mateinon.

Ha ! ha !

MATEINO, al Don Juan.

Sinjoro, kion vi faras do tie, kun Ĉarlino ? Ĉu vi parolas ankaŭ al ŝi pri amo ?

DON JUAN, mallaŭte, al Mateino.

Ne. Kontraŭe, ĝi estas ŝi, kiu certigis al mi sian deziron esti mia edzino, kaj mi respondis, ke mi estas endevigita kontraŭ vi.

ĈARLINO, al Don Juan.

Kion do volas de vi Mateino ?

DON JUAN, mallaŭte al Ĉarlino.

Ŝi estas ĵaluza vidante, ke mi vin alparolas, kaj tre volus, ke mi edziĝu kun ŝi ; sed mi diras al ŝi, ke vin ja mi volas.

MATEINO

Kio ! Ĉarlino !

DON JUAN, mallaŭte al Mateino.

Ĉio, kion vi diros al ŝi, estos senutila : ŝi metis tion ĉi en sian kapon.

ĈARLINO

Kiel do ! Mateino...

DON JUAN, mallaŭte al Ĉarlino.

Estas vane, ke vi ŝin alparolos : vi ne forprenos de ŝi tiun fantaziaĵon.

MATEINO

Ĉu ?

DON JUAN

Ne estas rimedo ŝin konvinki.

ĈARLINO

Mi volus...

DON JUAN, mallaŭte al Ĉarlino.

Si estas obstina, kiel ĉiuj diabloj.

MATEINO

Vere...

DON JUAN, mallaŭte al Mateino.

Nenion diru al ŝi, ŝi estas frenezulino.

ĈARLINO

Mi pensas...

DON JUAN, mallaŭte al Ĉarlino.

Lasu ŝin, ŝi estas delirulino.

MATEINO

Ne, ne, estas necese, ke mi parolu kun ŝi.

ĈARLINO

Mi volas vidi iom ŝiajn pravigojn.

MATEINO

Kio !...

DON JUAN, mallaŭte al Mateino.

Mi vetas, ke ŝi tuj diros al vi, ke mi promesis edziĝi kun ŝi.

ĈARLINO

Mi...

DON JUAN, mallaŭte al Ĉarlino.

Mi vetas, ke ŝi certigos al vi, ke mi donis al ŝi vorton, por preni ŝin kiel edzinon.

MATEINO

Ha ! Ĉarlino, ne estas bele kuri sur la kampon malpropran.

ĈARLINO

Ne estas honeste, Mateino, esti ĵaluza, ke la Sinjora Moŝto parolas kun mi.

MATEINO

Min la Sinjora Moŝto vidis unuan.

ĈARLINO

Se li vidis vin unuan, li vidis min duan, kaj promesis al mi edziĝi kun mi.

DON JUAN, mallaŭte al Mateino.

Nu, kion mi diris al vi ?

MATEINO, al Ĉarlino.

Mi kisas viajn manojn : ĝi estas kun mi, ne kun vi, ke li promesis edziĝi.

DON JUAN, mallaŭte al Ĉarlino.

Ĉu mi ne divenis ?

ĈARLINO

Diru tion ĉi al aliaj : ĝi estas kun mi, ankoraŭ unu fojon.

MATEINO

Jen li estas por min kontraŭdiri, se mi ne diras la veron.

ĈARLINO

Ĉu, sinjoro, vi promesis al ŝi kunedziĝi ?

DON JUAN, mallaŭte al Ĉarlino.

Vi mokas min.

MATEINO

Ĉu estas vere, Sinjoro, ke vi donis al ŝi vorton esti ŝia edzo ?

DON JUAN, mallaŭte al Mateino.

Ĉu vi povas havi tian penson ?

ĈARLINO

Vi vidas, ke ŝi certigas ĝin.

DON JUAN, mallaŭte al Ĉarlino.

Lasu ŝin fari.

MATEINO

Ne, ne, estas necese scii la veron.

MATEINO

Utilas juĝi tion ĉi.

ĈARLINO

Jes, Mateino, mi volas, ke la Sinjora Moŝto montru al vi vian naivegecon.

MATEINO

Jes, Ĉarlino, mi volas, ke la Sinjora Moŝto faru vin iom konfuzita.

ĈARLINO

Sinjoro, tranĉu la malpacon, mi petas.

MATEINO

Metu konsenton inter ni, sinjoro.

ĈARLINO, al Mateino.

Vi tuj vidos.

MATEINO, al Ĉarlino.

Vi tuj vidos mem.

ĈARLINO, al Don Juan.

Diru.

MATEINO, al Don Juan.

Parolu.

DON JUAN

Kion vi volas ke mi diru ? Vi certigas egale ambaŭ, ke mi promesis al vi preni vin kiel edzinojn ? Ĉu ĉiu el vi ne scias, kio estas efektiva pri tio, kaj ĉu estas necese, ke mi min komprenigu plie ? Kial devigi min pri tio al ripetoj ? Ĉu tiu, al kiu mi promesis efektive, ne havas ion en si per kio moki la paroladojn de l'alia ; kaj ĉu ŝi devas maltrankviliĝi, se nur mi plenumos mian promeson ? Ĉiuj paroladoj ne progresigas la aferojn. Estas necese fari, ne diri ; kaj la faroj decidas pli bone ol la diroj. Tial nur per tio mi volas interkonsentigi vin ; kaj oni vidos, kiam mi edziĝos, kiu el vi havas mian koron. (*Mallaŭte al Mateino*) Lasu ŝin kredi, kion ŝi volos. (*Mallaŭte al Ĉarlino*) Lasu ŝin sin flati en sia imagado. (*Mallaŭte al Mateino*) Mi vin amegas. (*Mallaŭte al Ĉarlino*) Mi estas tute via. (*Mallaŭte al Mateino*) Ĉiuj vizaĝoj estas malbelaj apud via. (*Mallaŭte al Ĉarlino*) Oni ne povas plu elporti la aliajn, kiam oni vidis vin. (*Laŭte*) Mi havas negravan ordonon por doni, mi venos vin retrovi post kvarono da horo.

SCENO VI-a

ĈARLINO, MATEINO, SGANARELO

ĈARLINO, al Mateino.

Mi estas tiu, kiun li amas, almenaŭ.

MATEINO, al Ĉarlino.

Gi estas mi, kun kiu li edziĝos.

SGANARELO, restigante Ĉarlinon kaj Mateinon.

Ha ! vi, malfeliĉaj knabinoj, mi kompatas vian senkulpecon, kaj ne povas elteni vidante vin kurantajn al via malfeliĉo. Kredu min unu kaj la alia ; ne amuzu vin je ĉiuj fabeloj, kiujn oni faras al vi, kaj restu en via vilaĝo.

SCENO VII-a

DON JUAN, ĈARLINO, MATEINO, SGANARELO

DON JUAN, en la fundo de l'teatro, flanken.

Mi tre volus scii, kial Sganarelo ne sekvas min.

SGANARELO

Mia mastro estas artifikulo, li nur intencas vin delogi kaj delogis jam multajn aliajn ; li estas l'edziĝanto de l'homa gento, kaj... *(Ekvidante Don Juanon)* Tio estas malvera ; kaj kiu ajn diros al vi tion ĉi, vi devos diri al tiu, ke li mensogas. Mia mastro ne estas l'edziĝanto de l' homa gento, li ne estas artifikulo, li ne intencis vin trompi, nek delogis aliajn. Ha ! nu, jen li estas ; demandu prefere **lin mem.**

DON JUAN, rigardante Sganarelon kaj suspektante, ke li parolis.

Jes !

SGANARELO

Sinjoro, ĉar la mondo estas plena je kalumniantoj, mi iris renkonten al la aferoj, kaj mi diris al ili, ke se iu diris al ili malbonon pri vi, ili tre sin gardu ĝin kredi, kaj ne ŝanceliĝu diri al tiu, ke li mensogas.

DON JUAN

Sganarelo !

SGANARELO, al Ĉarlino kaj Mateino.

Jes, Sinjora Moŝto estas honorulo ; mi garantias pri li.

DON JUAN

Hem !

SGANARELO

Ili estas malrespektuloj.

SCENO VIII-a

DON JUAN, LARAMEO, ĈARLINO, MATEINO, SGANARELO

LARAMEO, mallaŭte al Don Juan.

Sinjoro, mi venas vin averti, ke ne estas bone tie ĉi por vi.

DON JUAN

Kiel ?

LAREMEO

Dekdu viroj kun ĉevaloj vin serĉas, kiuj devas alveni tien ĉi post momento ; mi ne scias, per kia rimedo ili povis vin sekvi ; sed mi eksciis tiun novaĵon de vilaĝano, kiun ili pridemandis, kaj al kiu ili vin priskribis. La afero urĝas ; kaj ju plej baldaŭ vi povos eliri de tie ĉi estos des plej bona.

SCENO IX-a

DON JUAN, ĈARLINO, MATEINO, SGANARELO

DON JUAN, al Ĉarlino kaj Mateino.

Urĝanta afero min devigas foriri de tie ĉi, sed mi petas vin memori pri la vorto, kiun mi donis al vi, kaj kredi, ke vi havos novaĵojn de mi, antaŭ ol estos morgaŭ vespere.

SCENO X-a

DON JUAN, SGANARELO

DON JUAN

Ĉar la ludo ne estas egala, mi devos uzi artifikon, kaj lerte eviti la malfeliĉon, kiu min serĉas. Mi volas, ke Sganarelo vestu miajn vestojn, kaj mi...

SGANARELO

Sinjoro, vi mokas ! Riski esti mortigota sub viaj vestoj, kaj...

DON JUAN

Ni iru, rapide, tro multe da honoro mi faras al vi ; kaj tre feliĉa estas servisto, kiu povas havi la gloron morti por sia mastro !

SGANARELO

Mi dankas vin pro tia honoro. *(Sola)* Ho, ĉielo ! ĉar la afero estas pri morto, faru al mi la favoron, ke mi ne estu prenota por iu alia !

AKTO TRIA

La teatro prezentas arbaron.

SCENO UNUA

DON JUAN, kun vesto de kamparo ; SGANARELO, kiel kuracisto.

SGANARELO

Je mia fido, Sinjoro, konfesu, ke mi estis prava, kaj ke jen ni estas ambaŭ mirinde transvestigitaj. Via unua intenco tute ne estis oportuna, kaj tio ĉi nin kaŝas multe pli bone ol ĉio, kion vi volis fari.

DON JUAN

Vere estas, ke ci tiel estas bona ; kaj mi ne scias, de kie ci elterigis tiun ridindan aranĝaĵon.

SGANARELO

Jes. Ĝi estas la vesto de maljuna kuracisto, kiu estis lasita kiel garantiaĵo en la loko, kie mi ĝin prenis, kaj kostis al mi multe da mono por havi. Sed ĉu vi scias, sinjoro, ke tiu vesto faras jam min konsiderinda, ke mi estas salutata de la renkontatoj, ke oni venas peti konsilojn de mi kiel de lertulo ?

DON JUAN

Kiel do ?

SGANARELO

Kvin ses vilaĝanoj, vidante min pasi, venis al mi peti mian opinion pri diversaj malsanoj.

DON JUAN

Ci respondis al ili, ke ci nenion komprenas pri tio ?

SGANARELO

Mi ? Tute ne. Mi volis defendi la honoron de mia vesto ; mi argumentadis pri la malsano, kaj faris al ili receptojn por ĉiu.

DON JUAN

Kaj kiajn kuracilojn ci ordonis al ili ?

SGANARELO

Je mia fido, sinjoro, mi prenis ilin, kie ajn mi povis kapti ; mi faris miajn receptojn laŭ bontrovo, kaj estus ridiga afero, se la malsanuloj resaniĝus, kaj oni venus danki min pro tio.

DON JUAN

Kial ne ? Pro kia kaŭzo ci ne havus la samajn privilegiojn, kiel ĉiuj ceteraj kuracistoj ? Ili ne havas pli da parto ol ci en la resaniĝoj de malsanuloj, kaj ilia tuta arto estas nur grimaco. Ili faras nenion, krom ricevi la gloron de la feliĉaj okazoj ; kaj ci povas profiti, same kiel ili, la feliĉecon de la malsanulo, kaj vidi aljuĝita al ciaj kuraciloj ĉion, kio povas veni el la favoroj de l' sorto kaj fortoj de l'naturo.

SGANARELO

Kiel, sinjoro, vi estas ankaŭ malpia pri la kurac-arto ?

DON JUAN

Ĝi estas unu el la grandaj eraroj, kiuj estas inter la homoj.

SGANARELO

Kio ! vi ne kredas je la seneo, nek je la kasio, nek je la vino emetika ?

DON JUAN

Kaj kial ci volas, ke mi kredu je ili ?

SGANARELO

Vi havas ja animon tre malkredeman ! Tamen vi vidas, de kelka tempo, ke la vino emetika bruigas siajn ŝpinilojn *). Ĝiaj mirakloj konvertis la plej malkredemajn spiritojn ; kaj antaŭ tri semajnoj, mi vidis, mi kiu parolas kun vi, mirindan de ĝi efikon.

DON JUAN

Kaj kian ?

SGANARELO

Estis viro, kiu, de ses tagoj, agoniis ; oni ne sciis plu kion ordoni ; kaj ĉiuj kuraciloj nenion efikis ; oni ekpensis fine doni al li emetikon.

DON JUAN

Li resaniĝis, ĉu ne ?

SGANARELO

Ne, li mortis.

DON JUAN

La efiko estas mirinda.

---

*) Popola esprimo por diri : faras multe da bruo en la mondo.

SGANARELO

Kiel ! de ses tagoj li ne povis morti, kaj tio mortigis lin tuj. Ĉu vi deziras ion pli efikan ?

DON JUAN

Ci estas prava.

SGANARELO

Sed ni lasu la kuracarton, je kiu vi ne kredas, kaj ni parolu pri aliaj aferoj, ĉar tiu vesto donas al mi spriton, kaj mi sentas en mi emon por diskuti kontraŭ vi. Vi scias ja, ke vi permesas al mi la diskutojn, kaj malpermesas nur la riproĉojn.

DON JUAN

Nu ?

SGANARELO

Mi volas iom scii viajn pensojn funde. Ĉu estas eble, ke vi tute ne kredas je la ĉielo ?

DON JUAN

Ni lasu tion.

SGANARELO

Tio estas ne. Kaj je la infero ?

DON JUAN

He !

SGANARELO

Tute same. Kaj je la diablo, mi petas ?

DON JUAN

Jes, jes.

SGANARELO

Tiel malmulte. Ĉu vi ne kredas je l'alia vivo ?

DON JUAN

Ha ! ha ! ha !

SGANARELO

Jen homo, kiun mi havos multe da malfacilo por konverti. Kaj diru al mi iom, pri la koboldmonako, kion vi kredas ? He !

DON JUAN

La peston por la malspritulo !

SGANARELO

Kaj jen estas, kion mi ne povas elporti; ĉar nenio estas pli vera, ol la koboldmonako, kaj mi riskus la pendigŝon por tiu ĉi. Sed tamen oni devas kredi ion en la mondo. Kio estas do tio, kion vi kredas ?

DON JUAN

Kion mi kredas ?

SGANARELO

Jes.

DON JUAN

Mi kredas, ke du kaj du estas kvar, Sganarelo, kaj ke kvar kaj kvar estas ok.

SGANARELO

Jen estas bela kredo kaj belaj artikoloj de kredo ! Via religio, kiel mi vidas, estas do la aritmetiko ? Oni devas konfesi, ke strangaj frenezoj sin metas en la kapon de la homoj, kaj ke, kvankam oni bone studis, oni ta-

men estas multe malpli saĝa plej ofte. Miaflanke, sinjoro, mi ne studis kiel vi, dank' al Dio, kaj neniu povas fanfaroni esti iam instruinta min pri kio ajn ; sed per mia malgranda senco, mia malgranda prudento, mi vidas la aferojn pli bone ol ĉiuj libroj, kaj mi komprenas tre bone, ke tiu mondo, kiun mi vidas, ne estas fungo, kiu naskiĝis tute sola en unu nokto. Mi tre volus vin demandi, kiu faris tiujn arbojn, tiujn ŝtonegojn, tiun teron, tiun ĉielon jenan tie supre ; kaj ĉu ĉio tio ĉi sin konstruis mem. Jen vi estas, vi, ekzemple, vi staras tie ; ĉu vi naskiĝis tute sola, kaj ĉu ne estis necese, ke via patro gravediĝu vian patrinon por vin naski ? Ĉu vi povas vidi ĉiujn elpensaĵojn, el kiuj la maŝino de l'homo konsistas, ne admirante, kiamaniere tio estas aranĝita unu kun la alia ? tiujn nervojn, tiujn ostojn, vejnojn, arteriojn, ktp., tiun pulmon, tiun koron, tiun hepaton, kaj ĉiujn ceterajn enmetitojn, kiuj estas tie, kaj kiuj... Ho ! je Dio, interrompu do min, se vi volas. Mi ne povas disputi, se oni ne min interrompas. Vi silentas intence, kaj lasas min paroli pro bela malico.

DON JUAN

Mi atendas, ĝis cia argumento estos finita.

SGANARELO

Mia argumento estas, ke ekzistas en la homo, kion ajn vi povas diri, io admirinda, kion ĉiuj scienculoj ne povas klarigi. Ĉu tio ne estas mirinda, ke jen mi staras tie ĉi, kaj ke mi havas ion en la kapo, kio pensas cent diversajn aferojn en unu momento, kaj faras el mia korpo ĉion, kion ĝi volas ? Mi volas frapi la manojn, altigi la brakon, levi la okulojn al ĉielo, mallevi la kapon, movi la piedojn, iri dekstren, maldekstren, antaŭen, posten, turniĝi...*(Li falas turniĝante)*

DON JUAN

Bone ! jen cia argumento havas la nazon rompita !

SGANARELO

Morton de Dio ! mi estas ja malsprita amuziĝante argumenti kontraŭ vi, kredu kion vi volos : tute egale por mi, ke vi estos malsavita !

DON JUAN

Sed dume argumentante, mi kredas, ke ni forvojiris. Voku iom tiun homon, kiu estas tie, por lin demandi pri la vojo.

SCENO II-a

DON JUAN, SGANARELO, MALRIĈULO

SGANARELO

Hem ! ho ! homo ! baptano ! ho ! amiko ! vorteton mi petas. Sciigu al ni iom la vojon, kiu kondukas al la urbo.

MALRIĈULO

Vi devas nur sekvi tiun ĉi vojon, sinjoroj, kaj deturniĝi dekstramane, kiam vi estos ĉe la fino de l'arbaro ; sed mi vin avertas, ke vi devas vin gardadi, kaj ke de kelka tempo estas rabistoj ĉirkaŭ tie ĉi.

DON JUAN

Mi tre ŝuldas al vi, amiko, kaj dankas vin tutkore.

MALRIĈULO

Ĉu vi volas min helpi, sinjoro, per kelka almozo ?

DON JUAN

Ha ! ha ! via averto celas profiton, kiel mi vidas.

MALRIĈULO

Mi estas malriĉulo, sinjoro, rifuĝinta tute sola en tiu ĉi arbaro de dek jaroj, kaj mi ne forgesos preĝi la ĉielon, ke ĝi donu al vi ĉiuspecajn bonojn.

DON JUAN

He ! preĝu la ĉielon, ke ĝi donu al vi veston, ne zorgante pri la aferoj malpropraj.

SGANARELO

Vi ne konas la sinjoron, bonulo : li kredas nur, ke du kaj du estas kvar, kaj ke kvar kaj kvar estas ok.

DON JUAN

Kia estas via okupo inter tiuj arboj ?

MALRIĈULO

Preĝi la ĉielon dum la tuta tago por la prospereco de la honestuloj, kiuj donas ion al mi.

DON JUAN

Ĉu ne povas do esti, ke vi estu komforte ?

MALRIĈULO

Ho ve ! sinjoro, mi estas en la kiel eble plej granda mizero.

DON IUAN

Vi mokas ; homo preĝanta la ĉielon dum la tuta tago ne povas ne esti bone en siaj aferoj.

MALRIĈULO

Mi certigas vin, sinjoroj, ke plej ofte mi ne havas pecon da pano por meti sub la dentojn.

DON JUAN

Jen kio estas stranga, kaj vi estas tre malbone rekompencata pro viaj zorgoj : ha ! ha ! mi tuj donos al vi ormoneron, se vi volas ĵuri.

MALRIĈULO

Ha ! sinjoro, ĉu vi volus, ke mi faru tian pekon ?

DON JUAN

Vi devas nur vidi, ĉu vi volas gajni ormoneron aŭ ne ; jen estas unu, kiun mi donos al vi, se vi ĵuros. Tenu ; vi devas ĵuri.

MALRIĈULO

Sinjoro...

DON JUAN

Sen tio, vi ne havos ĝin.

SGANARELO

Nu, nu, ĵuru iom : ne estas malbono en tio.

DON JUAN

Prenu, jen ĝi estas, prenu, mi diras ; sed ĵuru do.

MALRIĈULO

Ne, sinjoro, mi pli amas morti de malsato.

DON JUAN

Iru, iru, mi donas ĝin al vi pro amo al la homaro. *(Rigardante en la arbaron)* Sed kion mi vidas tie ? Unu

homo atakatan de tri aliaj ! La parto estas tro malegala, kaj mi ne devas toleri tian malkuraĝaĵon. *(Li prenas la glavon en manon kaj kuras al la loko de l'batalo)*

SCENO III-a

SGANARELO, sola.

Mia mastro estas vera furiozulo, irante sin prezenti al danĝero ne lin serĉanta. Sed, je mia fido, la helpo utilis, kaj la duo forkurigis la trion.

SCENO IV-a

DON JUAN, DON KARLOS, SGANARELO, ĉe l'fundo de l'teatro.

DON KARLOS, remetante sian glavon.

Oni vidaŝ, per la forkuro de tiuj rabistoj, kian helpon povas alporti via brako. Permesu, sinjoro, ke mi vin danku pro faro tiel noblanima, kaj ke...

DON JUAN

Mi nenion faris, sinjoro, kion vi ne farus en mia loko. Nia propra' honoro estas interesata en tiaj aventuroj ; kaj la faro de tiuj kanajloj estis tiel malkuraĝa, ke oni partoprenus en ĝi ne kontraŭstarante. Sed per kia okazo vi troviĝis inter iliaj manoj ?

DON KARLOS

Mi okaze forvojaĝis de frato kaj de tuta nia sekvantaro ; kaj, dum mi penis ilin reatingi, mi renkontis tiujn rabistojn, kiuj tuj mortigis mian ĉevalon, kaj sen via braveco estus farintaj same al mi.

DON JUAN

Ĉu via intenco estas iri al la flanko de l'urbo ?

DON KARLOS

Jes, sed ne volante eniri ; kaj ni vidas nin devigataj, mia frato kaj mi, resti en la kamparo pro unu el tiuj aferoj, kiuj finkondukas la nobelojn oferi sin kaj sian familion al la severeco de sia honoro, ĉar fine ilia plej bona sukceso estas ĉiam pereiga, kaj se oni ne lasas la vivon, oni estas trudata lasi la reĝlandon ; kaj en tio ja mi trovas malfeliĉa la situacion de nobelo, ke li ne povas sin trankviligi per la tuta singardeco kaj honesteco de sia konduto, sed li estas sklavigata per la leĝoj de l'honoro al la malreguleco de konduto malpropra, kaj vidas vivon, ripozon kaj havaron siajn dependi de la kaprico de ĉiu ajn fibravegulo, kiu ekkuraĝos fari al li unu el tiuj ofendoj, pro kiuj honestulo devas perei.

DON JUAN

Oni havas tiun bonaĵon, ke oni trudas ricevi la saman riskon, kaj pasigi same malbone la tempon al tiuj havantaj la kapricon ekfari al ni ian ofendon senkaŭze. Sed ĉu ne estus maldiskretaĵo demandi vin, kia povas esti via afero ?

DON KARLOS

Tien ĝi venis, ke ne plu estas eble fari sekreton pri ĝi ; kaj kiam l'insulto fine aperiĝis, nia honoro jam devi-

gas nin ne kaŝi nian honton, sed aperigi nian venĝon kaj eĉ publikigi la intencon, kiun ni havas pri tio. Tial, sinjoro, mi ne ŝanceliĝos diri al vi, ke l'ofendo, kiun ni penas venĝi, estas fratino forlogita kaj forrabita el monakejo, kaj ke la faranto de tiu ofendo estas iu Don Juan Tenorio, filo de Don Luiz Tenorio. Ni serĉas lin de kelkaj tagoj, kaj ni sekvis lin hodiaŭ matene laŭ la raporto de servisto, kiu diris al ni, ke li eliris rajde, kun kvar aŭ kvin akompanantoj, kaj ke li sin direktis laŭlonge de tiu marbordo ; sed ĉiuj niaj zorgoj estis senutilaj, kaj ni ne povis eltrovi, kio fariĝis el li.

DON JUAN

Ĉu vi konas lin, Sinjoro, tiun Don Juan, pri kiu vi parolas ?

DON KARLOS

Ne, miaflanke. Mi neniam vidis lin, kaj nur aŭdis lin priskribitan de mia frato ; sed la famo ne diras pri li multe da bono, kaj li estas homo, kies vivo...

DON JUAN

Haltu, Sinjoro, mi petas. Li estas iom el miaj amikoj, kaj estus ĉe mi kvazaŭ malkuraĝaĵo, se mi aŭdus malbone pri li.

DON KARLOS

Pro l'amo al vi, sinjoro, mi diros pri li nenion, kaj tio estas la plej malgranda afero, kiun mi ŝuldas al vi savinto de mia vivo, ke mi silentu antaŭ vi pri persono, kiun vi konas, kiam mi ne povas paroli pri li ne dirante malbonon ; sed kiom ajn amiko vi estas por li, mi kuraĝas esperi, ke vi ne aprobos lian faron, kaj ne trovos stranga, ke ni penas ĝin venĝi.

DON JUAN

Kontraŭe, mi volas vin servi por tio kaj indulgi al vi senutilajn zorgojn. Mi estas amiko de Don Juan, mi ne povas ne esti tia, sed ne estas konsenteble, ke li ofendos senpune nobelojn, kaj mi promesas havigi al vi rekontentigon pri li.

DON KARLOS

Kaj kian kontentigon oni povas doni por tiaspecaj ofendoj ?

DON JUAN

Ĉiun, kiun via honoro povas deziri ; kaj ne klopodante por serĉi Don Juan'on plue, mi promesas trovigi lin en la loko, kiun vi volos, kaj kiam plaĉos al vi.

DON KARLOS

Tre dolĉa estas tia espero, sinjoro, al koroj ofenditaj ; sed, post tio, kion mi ŝuldas al vi, estus por mi tre sentebla doloro, se vi estus parto en la afero.

DON JUAN

Mi estas tiel kunigita kun Don Juan, ke li ne povas dueli, se mi ne duelas ankaŭ ; sed fine mi respondas pri li same kiel pri mi mem ; kaj vi devas nur diri, kiam vi volas, ke li aperu kaj donu al vi kontentigon.

DON KARLOS

Kiel kruela estas mia fatalo, ho ve ! ke mi ŝuldas al vi la vivon, kaj ke Don Juan estas el viaj amikoj !

SCENO V-a

DON ALONZO, DON KARLOS, DON JUAN, SGANARELO

DON ALONZO, parolante al sia sekvantaro, kaj ne vidante Don Karlos kaj Don Juan.

Trinkigu tie miajn ĉevalojn, kaj oni konduku ilin post mi ; mi volas marŝi iom piede. *(Ekvidante ilin ambaŭ)* Ho ĉielo ! Kion mi vidas tie ĉi ! Kio ! mia frato, jen vi estas kun nia morta malamiko !

DON KARLOS

Nia morta malamiko !

DON JUAN, metante la manon sur la kapon de sia glavo.

Jes, mi estas Don Juan mem, kaj la supereco de l' nombro ne devigos min voli malmontri mian nomon.

DON ALONZO, metante la glavon en la manon.

Ha ! perfidulo ! vi devas perei, kaj...

DON KARLOS

Ha ! frato, haltu ! Mi ŝuldas al li la vivon, kaj sen la helpo de lia brako, mi estus mortigita de la rabistoj, kiujn mi renkontis.

DON ALONZO

Kaj vi volas, ke tia konsidero malhelpu nian venĝon ? ĉiuj servoj, kiujn faras al ni malamika mano, havas nenian meriton por aldevigi nian animon, kaj se oni devas mezuri la ŝuldon laŭ la ofendo, via dankeco, mia frato,

estas tie ĉi ridinda ; kaj ĉar la honoro estas senfine pli kara ol la vivo, tio estas ĝuste nenion ŝuldi, se ni ŝuldas la vivon al tiu, kiu forprenis de ni la honoron.

DON KARLOS

Mi scias la diferencon, frato, kiun nobelo devas ĉiam meti inter unu kaj la alian ; kaj la dankeco pro la ŝuldo ne nuligas ĉe mi la venĝecon pro la ofendo ; sed permesu, ke mi tion redonu al li, kiun li pruntis al mi, ke mi elpagu tuj la ŝuldatan vivon per prokrasto de mia venĝo, kaj lasu al li la liberecon ĝui dum kelkaj tagoj la frukton de lia bonfaro.

DON ALONZO

Ne, ne, prokrasti nian venĝon, tio estas ĝin enriskigi, kaj la okazo ĝin kapti povas ne plu reveni. La ĉielo prezentas ĝin al ni nune : ni ja devas profiti ĝin. Kiam la honoro estas morte vundita, oni ne devas pripensi iajn uzotajn mezurojn ; kaj se vi maldeziras prunti vian brakon al tiu faro, vi devas nur deiri, kaj lasi al mia mano la gloron de tia ofero.

DON KARLOS

Indulgu, frato...

DON ALONZO

Ĉiuj paroladoj estas superfluaj ; li devas morti.

DON KARLOS

Haltu, mi diras, frato. Mi tute ne permesos, ke oni ataku lian vivon ; mi ĵuras la ĉielon, ke mi defendos lin tie ĉi kontraŭ kiu ajn, kaj mi scios fari al li remparon el tiu sama vivo, kiun li savis ; por trafigi viajn batojn, vi bezonas trabori min.

DON ALONZO

Kio ! vi prenas la partion de nia malamiko kontraŭ mi ; kaj, anstataŭ esti kaptita ĉe lia vido de la samaj ekscitoj, kiujn mi sentas, vi kontraŭe vidigas por li sentojn plenajn je dolĉeco !

DON KARLOS

Mia frato, ni montru moderecon en rajta faro ; kaj ne venĝu nian honoron kun tia senbrideco, kiun vi vidigas. Ni havu koron, kies ni estu regantoj, kuraĝon, kiu havu nenion sovaĝan, kaj rilatu al la aferoj per pura konsiliĝo kun nia prudento, kaj ne per la movo de blinda kolero. Mi ne volas, mia frato, resti ŝuldanta al mia malamiko ; mi havas al li ŝuldon, kiun mi bezonas antaŭ ĉio elpagi. Nia venĝo, kvankam prokrastita, ne estos malpli frapanta ; kontraŭe, ĝi tiros el tio plibonaĵon ; kaj tiu okazo, ke ni povis ĝin preni, aperigos ĝin pli justa antaŭ la okuloj de ĉiuj.

DON ALONZO

Ho ! kia stranga malforteco kaj terurega blindeco tiel enriskigi la interesojn de sia honoro pro la ridinda penso de malreala ŝuldo !

DON KARLOS

Ne, mia frato, ne vin maltrankviligu. Se mi faras kulpon, mi scios ja ĝin ripari, kaj mi prenas sur min la tutan zorgon de nia honoro ; mi scias, al kio ĝi min aldevigas, kaj tiu halto unutaga, kiun mia dankeco petas de ĝi, nur pligrandigos la deziregon, kiun mi havas ĝin kontentigi. Don Juan, vi vidas, ke mi zorgas redoni al vi la bonon, kiun mi ricevis de vi, kaj vi devas per tio juĝi pri la cetero, kredi ke mi elpagas kun la sama fajreco, kion mi ŝuldas, kaj ke mi ne estos malpli akurata

pagi al vi la ofendon ol la bonfaron. Mi ne volas vin devigi tie ĉi klarigi viajn sentojn, kaj mi donas al vi la liberecon pripensi viatempe la prenotajn decidojn. Vi konas sufiĉe la gravecon de l'ofendo, kiun vi faris al ni, kaj mi vin faras mem juĝonto pri la rekontentigoj, kiujn ĝi postulas. Ekzistas kvietaj rimedoj por nin kontentigi ; ekzistas ankaŭ perfortaj kaj sangaj, sed fine, kian ajn elekton vi faros, vi donis al mi vian vorton, ke vi havigos al mi rekontentigon el Don Juan. Pripensu havigi ĝin, mi petas, kaj memoru, ke ekster tie ĉi mi jam ŝuldas nur al mia honoro.

DON JUAN

Mi nenion elpostulis de vi, kaj plenumos, kion mi promesis.

DON KARLOS

Ni iru, mia frato ; momento da kvieteco faras nenian malservon al la severeco de nia devo.

SCENO VI-a

DON JUAN, SGANARELO

DON JUAN

He ! he ! Sganarelo !

SGANARELO, elirante de la loko, kie li estas kaŝita.

Kio estas ?

DON JUAN

Kiel ! ci forkuras, kiam oni atakas min ?

SGANARELO

Pardonu, Sinjoro, mi nur venas de tie ĉi apude. Mi kredas, ke tiu vesto estas laksa, kaj ke oni prenas laksilon ĝin portante.

DON JUAN

La peston por la senhontulo ! Kovrigu almenaŭ cian malbravecon per pli honesta vualo ! ĉu ci scias, kiu estas tiu, kies vivon mi savis ?

SGANARELO

Mi ? Ne.

DON JUAN

Li estas frato de Elviro.

SGANARELO

Frato...

DON JUAN

Li estas sufiĉe honesta viro ; li bone agis, kaj mi bedaŭras havi malpacon kun li.

SGANARELO

Estus facile al vi pacigi ĉion.

DON JUAN

Jes, sed mia pasio estas eluzita por Sinjorino Elviro, kaj la aldeviĝo ne konsentas kun mia humoro. Mi amas liberecon en amo, ci scias, kaj mi ne povas decidiĝi enfermi mian koron inter kvar muroj. Mi diris tion al ci dudekfoje, mi havas naturan deklivon lasi min iri al ĉio, kio altiras min. Mia koro apartenas al ĉiuj virinoj ; kaj ili ja devas ĝin preni laŭvice, kaj konservi tiel longe, kiel ili povos. Sed kiu estas la belega konstruaĵo, kiun mi vidas inter tiuj arboj ?

SGANARELO

Ĉu vi ne scias ?

DON JUAN

Ne vere.

SGANARELO

Bone ; ĝi estas la tombujo, kiun la Komandoro estis fariganta, kiam vi mortigis lin.

DON JUAN

Ha ! Ci estas prava. Mi ne sciis, ke je tiu ĉi flanko ĝi sidas. Ĉiuj diris al mi mirindaĵojn pri tiu faraĵo, same kiel pri la statuo de l'Komandoro ; kaj mi ekvolas ĝin viziti.

SGANARELO

Sinjoro, ne iru tien !

DON JUAN

Kial ?

SGANARELO

Tio ne estas ĝentila viziti homon, kiun vi mortigis.

DON JUAN

Kontraŭe, tio estas vizito, per kiu mi volas fari al li ĝentilaĵon, kaj kiun li devas ricevi favore, se li estas ĝentilulo. Nu, ni iru ĉi tien. (*La tombujo malfermiĝas, kaj oni vidas la statuon de la Komandoro*).

SGANARELO

Ha ! kiel bela tio estas ! kiel belaj statuoj ! bela marmoro ! belaj kolonegoj ! Ha ! kiel bela tio estas ! Kion vi diras pri tio, Sinjoro ?

DON JUAN

Ke oni ne povas vidi la gloramon de mortinta homo iri pli malproksimen ; kaj kion mi trovas admirinda, estas tio, ke homo, kiu kontentiĝis dum sia vivo per sufiĉe simpla loĝejo, volas havi tiel belegan por la tempo, kiam li ne havas plu kion fari el ĝi.

SGANARELO

Jen estas la statuo de l'Komandoro.

DON JUAN

Je Dio ! Jen li estas bona, kun sia vesto de romana imperiestro !

SGANARELO

Mian fidon, Sinjoro, jen estas io bone farita ! Ŝajnas, kvazaŭ li estus vivanta, kaj tuj ekparolonta. Li ĵetas al ni rigardojn, kiuj min timigus, se mi estus tute sola, kaj mi pensas, ke li ne plezuras vidante nin.

DON JUAN

Li estaŝ malprava ; kaj tio estus danki malbone la honoron, kiun mi faras al li. Demandu lin, ĉu li volas veni vespermanĝi kun mi.

SGANARELO

Ĝi estas afero, kiun li ne bezonas, mi kredas.

DON JUAN

Demandu lin, mi diras.

SGANARELO

Ĉu vi mokas ? Oni estus frenezulo, se oni irus alparoli statuon.

DON JUAN

Faru, kion mi diras al ci.

SGANARELO

Kia strangaĵo ! Sinjoro Komandoro... *(flanken)* Mi ridas je mia malsaĝaĵo, sed mia mastro min devigas fari. *(laŭte)* Sinjoro Komandoro, mia mastro Don Juan vin demandas, ĉu vi volas fari al li la honoron veni vespermanĝi kun li. *(La statuo mallevas la kapon)* Ha !

DON JUAN

Kio estas ? Kion ci havas ? Diru do ! ĉu ci volas paroli ?

SGANARELO, mallevante la kapon, kiel la statuo.

La statuo...

DON JUAN

Nu, kion ci volas diri, perfidulo ?

SGANARELO

Mi diras al vi, ke la statuo...

DON JUAN

Nu, la statuo ! Mi elbategos cin, se ci ne parolas.

SGANARELO

La statuo faris signon al mi.

DON JUAN

La peston por la kanajlo !

SGANARELO

Ĝi faris al mi signon, mi diras ; nenio estas pli vera. Iru mem alparoli ĝin. Eble...

DON JUAN

Venu, fripono, venu. Mi volas, ke ci tuŝu bone per la fingro cian malbravecon. Atentu. Ĉu lia Komandora Moŝto volas veni vespermanĝi kun mi ? *(La statuo malevas ree la kapon).*

SGANARELO

Mi ne volus veti pri tio dek pistolojn. Nu, Sinjoro ?

DON JUAN

Ni iru, ni eliru de tie.

SGANARELO, sola.

Jen estas niaj libersprituloj, kiuj volas nenion kredi !

AKTO KVARA

La teatro prezentas la ĉambraron de Don Juan.

SCENO UNUA

DON JUAN, SGANARELO, RAGOTENO

DON JUAN, al Sganarelo.

Kio ajn ĝi estas, ni lasu tion : estas bagatelo, kaj ni povas esti trompitaj de falsa lumo, aŭ surprizitaj de ia vaporo, kiu konfuzis nian vidon.

SGANARELO

He Sinjoro ! ne provu kontraŭdiri tion, kion ni vidis per jenaj okuloj. Nenio estas pli vera ol tiu kapsigno ; kaj mi ne dubas, ke la ĉielo, maledifita de via vivo, naskis tiun miraklon, por vin konvinki, kaj vin eltiri de...

DON JUAN

Aŭskultu. Se ci tedos min plue per ciaj malspritaj moralaĵoj, se ci diros ankoraŭ al mi eĉ unu vorteton pri tio, mi tuj vokos iun, pripetos skurĝon, tenigos cin per tri aŭ kvar homoj kaj buĉos cin per mil batoj. Ĉu ci komprenas min bone ?

SGANARELO

Tre bone, Sinjoro, kiel eble plej bone. Vi komprenigas vin tre klare ; tio estas bona en vi, ke vi ne serĉas deflankaĵojn : vi diras la aferojn kun admirinda klareco.

DON JUAN

Nu, oni igu min vespermanĝi kiel eble plej frue. Seĝon, knabeto.

SCENO II-a

DON JUAN, SGANARELO, LAVIOLETO, RAGOTENO

LAVIOLETO

Sinjoro, jen estas via vendisto, sinjoro Dimanĉo, kiu deziras paroli kun vi.

SGANARELO

Bone. Jen kion ni bezonas, komplimento de kreditoro. Pri kio li ekpensas venante al ni pripeti monon, kaj kial ci ne diris al li, ke Sinjora Moŝto forestas ?

LAVIOLETO

De tri kvaronoj da horo mi diras ĝin al li ; sed li ne volas kredi, kaj sidiĝis tie por atendi.

SGANARELO

Li atendu tiel longe, kiel li volos.

DON JUAN

Ne, kontraŭe, lasu lin eniri. Estas tre malbona politiko sin kaŝigi al la kreditoroj. Konvenas ilin pagi per io : kaj mi havas la sekreton ilin resendi kontentigitajn, ne donante moneron.

SCENO III-a

DON JUAN, SINJORO DIMANĈO, SGANARELO, LAVIOLETO, RAGOTENO

DON JUAN

Ha ! Sinjoro Dimanĉo, alproksimiĝu. Kiel ravata mi estas vin vidi, kaj kiel mi koleras kontraŭ miaj servistoj, ke ili ne lasis vin eniri tuj ! Mi ordonis, ke oni ne lasu min paroli kun iu ajn : sed tiu ordono ne estas por vi, kaj vi rajtas trovi nenian pordon fermitan ĉe mi.

SINJORO DIMANĈO

Sinjoro, mi estas al vi tre danka.

DON JUAN, parolante al Lavioleto kaj Ragoteno.

Je Dio ! friponoj, mi lernigos vin lasi Sinjoron Dimanĉon en antaŭĉambro, kaj mi konigos al vi la personojn.

SINJORO DIMANĈO

Sinjoro, nenio estas.

DON JUAN, al Sinjoro Dimanĉo.

Kiel ! diri al vi, ke mi forestas, al Sinjoro Dimanĉo, al la plej bona el miaj amikoj !

SINJORO DIMANĈO

Sinjoro, mi estas via servanto. Mi venis...

DON JUAN

Nu rapide, seĝon por Sinjoro Dimanĉo.

SINJORO DIMANĈO

Sinjoro, mi estas bone, kiel mi estas.

DON JUAN

Ne, ne, mi volas, ke vi sidu kontraŭ mi.

SINJORO DIMANĈO

Tio ne estas necesa.

DON JUAN

Formetu tiun fleksoseĝon, kaj alportu brakseĝegon.

SINJORO DIMANĈO

Sinjoro, vi mokas, kaj...

DON JUAN

Ne, ne, mi scias, kion mi ŝuldas al vi : kaj mi ne volas, ke oni metu diferencon inter ni ambaŭ.

SINJORO DIMANĈO

Sinjoro,...

DON JUAN

Nu, sidiĝu.

SINJORO DIMANĈO

Ne utilas, Sinjoro, kaj mi havas nur vorton por diri. Mi venis...

DON JUAN

Metu vin tien, mi diras.

SINJORO DIMANĈO

Ne, Sinjoro, mi estas bone. Mi venas por...

DON JUAN

Ne, mi ne aŭskultas vin, se vi ne sidas.

SINJORO DIMANĈO

Sinjoro, mi faras, kion vi volas. Mi...

DON JUAN

Je Dio, Sinjoro Dimanĉo, vi fartas bone.

SINJORO DIMANĈO

Jes, Sinjoro, por fari al vi servon. Mi venis...

DON JUAN

Vi havas fundon de sano admirindan, lipojn freŝajn, haŭtkoloron helruĝan, kaj okulojn akrajn.

SINJORO DIMANĈO

Mi tre volus...

DON JUAN

Kiel fartas Sinjorino Dimanĉo, via edzino ?

SINJORO DIMANĈO

Tre bone, Sinjoro, dank' al Dio.

DON JUAN

Ŝi estas bonega virino.

SINJORO DIMANĈO

Ŝi estas via servantino, Sinjoro. Mi venis...

DON JUAN

Kaj via filineto, Klaŭdino, kiel ŝi fartas ?

SINJORO DIMANĈO

Kiel eble plej bone.

DON JUAN

Kiel beleta knabineto ŝi estas ! Mi amas ŝin el mia tuta koro.

SINJORO DIMANĈO

Tro multe da honoro vi faras al ŝi, Sinjoro. Mi vin...

DON JUAN

Kaj la malgranda Koĉjo, ĉu li ĉiam bruigas multe per sia tamburo ?

SINJORO DIMANĈO

Ĉiam same, Sinjoro. Mi...

DON JUAN

Kaj via hundeto Brusketo, ĉu ĝi murmuregas ĉiam tiel forte, kaj mordas ĉiam tiel bone je la kruroj de personoj, kiuj iras vin viziti ?

SINJORO DIMANĈO

Pli ol iam, Sinjoro, kaj ni ne povas ĝin kvietigi.

DON JUAN

Ne miru, ke mi informas min pri la novaĵoj de la tuta familio ; ĉar mi prenas je ili multe da intereso.

SINJORO DIMANĈO

Ni estas al vi, Sinjoro, senfine dankaj. Mi...

DON JUAN, etendante al li la manon.

Tuŝu do, Sinjoro Dimanĉo ; ĉu vi estas efektive el miaj amikoj ?

SINJORO DIMANĈO

Sinjoro, mi estas via servanto.

DON JUAN

Je Dio ! Mi estas tutkore via.

SINJORO DIMANĈO

Vi honoras min troe. Mi...

DON JUAN

Nenio estas, kion mi ne farus por vi.

SINJORO DIMANĈO

Sinjoro, vi havas tro da boneco por mi.

DON JUAN

Kaj tio estas sen profitemo, mi vin petas tiel kredi.

SINJORO DIMANĈO

Mi ne meritis tian favoron, certege. Sed, Sinjoro...

DON JUAN

Nu, Sinjoro Dimanĉo, sen ceremonio, ĉu vi volas vespermanĝi kun mi ?

SINJORO DIMANĈO

Ne, Sinjoro, mi devas reiri baldaŭ. Mi...

DON JUAN, leviĝante.

Ni iru, rapide, lumigilon por konduki Sinjoron Dimanĉon, kaj tri aŭ kvar miaj servistoj prenu moskedojn por lin akompani.

SINJORO DIMANĈO, leviĝante ankaŭ.

Sinjoro, ne estas necese, kaj mi deiros ja tute sola. Sed...

(Sganarelo formovas la seĝojn rapide.)

DON JUAN

Kiel ! Mi volas, ke oni vin akompanu, kaj tro interesiĝas je via persono. Mi estas via servanto kaj plie via ŝuldanto.

SINJORO DIMANĈO

Ha ! Sinjoro...

DON JUAN

Tiun aferon mi ne kaŝas, kaj diras al ĉiuj.

SINJORO DIMANĈO

Se...

DON JUAN

Ĉu vi volas, ke mi vin rekonduku ?

SINJORO DIMANĈO

Ha ! Sinjoro, vi mokas. Sinjoro...

DON JUAN

Kisu do min, se plaĉas. Mi petas vin ankoraŭ unu fojon esti konvinkata, ke mi estas tute via, kaj ke nenio estas en la mondo, kion mi ne farus por via servo. *(Li eliras.)*

SCENO IV-a

SINJORO DIMANCO, SGANARELO

SGANARELO

Oni devas konfesi, ke vi havas en Sinjora Moŝto homon, kiu tre amas vin.

SINJORO DIMANĈO

Estas vere ; li faras al mi tiom da ĝentilaĵoj kaj komplimentoj, ke mi neniam povos peti lin pri mono.

SGANARELO

Mi certigas vin, ke lia tuta servistaro pereus por vi, kaj mi volus, ke io okazu al vi, ke iu ekkuraĝu doni al vi batojn per bastono, vi vidus kiamaniere...

SINJORO DIMANĈO

Mi tiel kredas, sed, Sganarelo, mi vin petas diri al li vorteton pri mia mono.

SGANARELO

Ho ! Ne maltrankviliĝu, li vin pagos kiel eble plej bone.

SINJORO DIMANĈO

Sed, vi, Sganarelo, vi ŝuldas al mi ion viaparte.

SGANARELO

Fi ! Ne parolu al mi pri tio.

SINJORO DIMANĈO

Kiel ! Mi...

SGANARELO

Ĉu mi ne scias bone, ke mi ŝuldas al vi ?

SINJORO DIMANĈO

Jes, sed...

SGANARELO

Ni iru, Sinjoro Dimanĉo, mi tuj lumigos al vi.

SINJORO DIMANĈO

Sed mia mono ?

SGANARELO, prenante Sinjoron Dimanĉo ĉe la brako.

Ĉu vi mokas ?

SINJORO DIMANĈO

Mi volas...

SGANARELO, lin tirante.

He !

SINJORO DIMANĈO

Mi pretendas...

SGANARELO, puŝante lin al la pordo.

Bagateloj !

SINJORO DIMANĈO

Sed...

SGANARELO, puŝante lin ankoraŭ.

Fi !

SINJORO DIMANĈO

Mi...

SGANARELO, lin puŝante tute el la teatro.

Fi ! Mi diras.

SCENO V-a

DON JUAN, SGANARELO, LAVIOLETO

LAVIOLETO, al Don Juan.

Sinjoro, jen estas sinjoro via patro.

DON JUAN

Ha ! jen mi estas bone ! Mi bezonis tiun viziton por furioziĝi.

SCENO VI-a

DON LUIŻ, DON JUAN, SGANARELO

DON LUIZ

Mi vidas ja, ke mi vin embarasas, kaj vi tre facile vin senigus je mia veno. Por diri la veron, ni strange nin ĝenas unu la alian ; kaj se vi estas laca min vidi, mi estas ankaŭ tre laca je viaj diboĉoj. Ho ve ! kiel malmulte ni scias, kion ni faras, kiam ni ne lasas al la ĉielo la zorgon pri la aferoj, kiujn ni bezonas, kiam ni volas esti pli sagacaj ol ĝi, kaj ektedas ĝin per niaj blindaj deziroj kaj senpripensaj petoj ! Mi deziris filon kun senegala fervoro, mi petis lin senĉese kun nekredeblaj ekscitoj : kaj tiu filo, kiun mi ricevas lacigante la ĉielon per petoj, estas la ĉagreno kaj turmento de tiu vivo mem, kies ĝojo

kaj konsolo mi kredis, ke li estos. Per kia okulo, laŭ via opinio, vi pensas, ke mi povas vidi tiun amason da senindaj faroj, kies malbelan mienon oni malfacilege dolĉigas antaŭ la okuloj de l'mondo, tiun ĉiaman serion da malbonaj aferoj, kiuj devigas nin ĉiuhore lacigi la bonecon de la regnestro kaj elkonsumis apud li la meriton de miaj servoj kaj la krediton de miaj amikoj ? Ha ! Kia malnobleco estas via ! ĉu vi ne ruĝiĝas meriti tiel malmulte vian devenon ? ĉu vi rajtas, diru al mi, tiri el ĝi ian fierecon ? Kaj kion vi faris en la mondo por esti nobelo ? ĉu vi kredas, ke sufiĉas porti nobelajn nomon kaj insignojn, kaj ke estas por ni gloro deveni de nobla sango, kiam ni vivas kiel malnobluloj ? Ne, ne, deveno estas nenio, kie virto ne estas. Tial ni havas parton en la gloro de niaj prapatroj nur laŭmezure se ni penas similiĝi al ili ; kaj tiu brilo de iliaj faroj, kiun ili ĵetas sur nin, trudas al ni devigon fari al ili la saman honoron, sekvi la paŝojn, kiujn ili desegnas antaŭ ni, kaj ne degeneri de ilia virto, se ni volas esti ŝatataj kiel iliaj veraj idoj. Vi do vane devenas de la praavoj, el kiuj vi estas naskita ; ili malkonfesas vin kiel sian sangon, kaj ĉio, kion ili faris famindan, donas al vi nenian bonaĵon ; kontraŭe, ĝia brilo resaltas sur vi nur por via malhonoro, kaj ilia gloro estas torĉo, kiu lumigas antaŭ ĉiuj okuloj la hontigon de viaj faroj. Eksciu fine, ke nobelo malbone vivanta estas monstro en la naturo ; ke la virto estas la ĉefa titolo de nobeleco ; ke mi multe malpli konsideras la nomon, kiun oni subskribas ol la faroj, kiujn oni faras ; kaj ke mi multe pli ŝatus la filon de hokportisto, kiu estus honestulo, ol la filon de monarko, kiu vivus same kiel vi !

DON JUAN

Sinjoro, se vi sidus, vi estus pli komforte por paroli.

DON LUIZ

Ne, arogantulo, mi ne volas sidiĝi nek paroli plue, kaj mi ja vidas, ke ĉiuj miaj vortoj neniel efikas sur vian animon ; sed sciu, seninda filo, ke la patra fervoro estas fine venkita de viaj faroj ; ke mi scios, pli frue ol vi pensas, meti finon al viaj senbridaĵoj, antaŭveni sur vi la koleron de la ĉielo, kaj lavi, per via puno, la honton esti naskinta vin !

SCENO VII-a

DON JUAN, SGANARELO

DON JUAN, alparolante ankoraŭ sian patron, kvankam li eliris.

He ! Mortu kiel eble plej baldaŭ, tio estas la plej bona, kion vi povas fari. Sian vicon ĉiu devas havi, kaj mi furioziĝas vidante patrojn, kiuj vivas tiom egaltempe kiom iliaj filoj. *(Li sidiĝas en brakseĝon.)*

SGANARELO

Ha ! Sinjoro, vi malpravas.

DON JUAN, leviĝante.

Mi malpravas !

SGANARELO, tremante.

Sinjoro...

DON JUAN

Mi malpravas !

SGANARELO

Jes, Sinjoro, vi malpravas tolerinte lian diron, kaj vi devis lin meti eksteren per la ŝultroj. Ĉu oni vidis iam ion pli malkonvenan ? Patron venantan fari riproĉojn al sia filo, kaj diri al li, ke li korektu siajn farojn, rememoru sian devenon, konduku vivon de honestulo, kaj cent aliajn tiaspecajn malsaĝaĵojn ! ĉu tio povas toleriĝi kontraŭ tia homo, kia vi estas, scianta kiel oni devas vivi ? Mi admiras vian paciencon, kaj, se mi estus en via loko, mi sendus lin forpromeni. *(mallaŭte flanken)* Ho malbenita komplezemo ! al kio vi min devigas !

DON JUAN

Ĉu oni igos min baldaŭ vespermanĝi ?

SCENO VIII-a

DON JUAN, SGANARELO, RAGOTENO

RAGOTENO

Sinjoro, jen estas vualita Sinjorino, kiu venas paroli kun vi.

DON JUAN

Kio povas esti ?

SGANARELO

Oni devas vidi.

SCENO IX-a

SINJORINO ELVIRO, vualita, DON JUAN, SGANARELO

SINJORINO ELVIRO

Ne estu surprizata, Don Juan, min vidante je tiu ĉi horo, kaj en tia vesto. Estas trudanta motivo, kiu min devigas al tiu vizito ; kaj tio, kion mi havas por diri al vi, tute ne permesas prokraston. Mi ne venas tien ĉi plena je tiu kolero, kiun mi ĵus antaŭe eksplodigis ; kaj vi vidas min tre ŝanĝitan el tio, kio mi estis hodiaŭ matene. Mi ne estas plu tiu Sinjorino Elviro, kiu faris malbondezirojn kontraŭ vi, kaj kies incitegita animo ĵetis nur minacojn kaj spiris nur venĝon. La ĉielo pelis el mia animo ĉiujn senindajn fervorojn, kiujn mi sentis por vi, ĉiujn tumultajn elbolojn de krima aldoniteco, ĉiujn hontindajn ekscitojn de tera kaj maldelikata amo ; kaj ĝi lasis por vi en mia koro nur flamon elpurigitan de ĉiu senta interrilato, tute sanktan kordolĉecon, amon malligitan je ĉio, kiu ne agas por si, kaj zorgas nur pri via intereso.

DON JUAN, mallaŭte, al Sganarelo.

Ci ploras, kiel mi pensas ?

SGANARELO

Pardonu min.

SINJORINO ELVIRO

Tiu perfekta kaj pura amo min kondukas tien ĉi por via bono, por komuniki al vi averton de la ĉielo, kaj provi

eltiri vin de la profundegaĵo, al kiu vi kuras. Jes, Don Juan, mi scias ĉiujn senbridaĵojn de via vivo ; kaj tiu sama ĉielo, kiu tuŝis mian koron kaj ĵetigis miajn okulojn sur la erarojn de mia konduto, inspiris al mi, ke mi venu vin trovi, kaj diru al vi ĝiaparte, ke viaj ofendoj elkonsumis ĝian indulgemon, ke ĝia timeginda kolero estas preta fali sur vin, ke estas en via povo ĝin eviti per senprokrasta pento, kaj ke eble vi ne havas ankoraŭ unu tagon por povi vin forsavi de la plej granda el ĉiuj malfeliĉoj. Miaflanke, mi ne teniĝas plu al vi per kia ajn monda aldoniteco. Mi revenis, dank' al la ĉielo, el ĉiuj miaj frenezaj pensoj ; mia formondiĝo estas decidita, kaj mi petas nur sufiĉe da vivo por povi ellavi la kulpon, kiun mi faris, kaj meriti per severa pentofaro pardonon pro la blindeco, en kiun enigis min la ekscitoj de kondamninda pasio. Sed en tiu formondiĝo, mi havus treegan doloron, se persono, kiun mi dolĉege amis, fariĝus bedaŭrinda ekzemplo de la ĉiela justeco ; kaj ĝi estos nekredebla ĝojo, se mi povos sukcesi, ke vi volos deturni de super via kapo la teruregan baton, kiu vin minacas. Mi petegas vin, Don Juan, donu al mi, kiel lastan favoron, tiun dolĉan konsolon ; ne rifuzu al mi vian savon, kiun mi petas per larmoj ; kaj se vi ne estas tuŝata de via intereso, estu almenaŭ de miaj petoj, kaj indulgu min je la kruela malplezuro vidi vin kondamnitan al eternaj turmentoj.

SGANARELO, flanken.

Kompatinda virino !

SINJORINO ELVIRO

Mi amis vin kun treega fervoro ; nenio en la mondo estis al mi tiel kara kiel vi ; mi forgesis mian devon por vi, mi faris ĉion por vi ; kaj la tuta rekompenco, kiun

mi petas pro tio, estas, ke vi korektu vian vivon, kaj avertu vian pereon. Savu vin, mi petas, ĉu pro amo al vi, ĉu pro amo al mi. Ankoraŭ unu fojon, Don Juan, mi petas vin per larmoj ; kaj, se ne estas sufiĉaj la larmoj de persono, kiun vi amis, mi vin petegas per ĉio, kio estas plej kapabla vin tuŝi.

SGANARELO, flanken, rigardante Don Juan.

Koro de tigro !

SINJORINO ELVIRO

Mi deiras post tiu parolado ; kaj jen estas ĉio, kion mi havis por diri.

DON JUAN

Sinjorino, estas malfrue, restu tie ĉi. Oni loĝigos vin plej bone, kiel oni povos.

SINJORINO ELVIRO

Ne, Don Juan, ne min restigu plue.

DON JUAN

Sinjorino, vi faros al mi plezuron restante, mi vin certigas.

SINJORINO ELVIRO

Ne, mi diras : ni ne perdu tempon per superfluaj paroladoj. Lasu min deiri rapide, faru nenian insiston por min konduki, kaj vi nur pripensu profiti mian averton.

SCENO X-a

DON JUAN, SGANARELO

DON JUAN

Ĉu ci efektive scias, ke mi ree sentis iom da ekscito por ŝi, ke mi trovis agrablaĵon en tiu stranga novaĵo, kaj ke ŝia senzorga vesto, ŝia mieno sopiranta, kaj ŝiaj larmoj vekis en mi kelkajn restaĵojn de estingita fajro ?

SGANARELO

Tio estas, ke ŝiaj vortoj neniel efikis sur vi.

DON JUAN

Rapide vespermanĝon.

SGANARELO

Tre bone.

SCENO XI-a

DON JUAN, SGANARELO, LAVIOLETO, RAGOTENO

DON JUAN, sidiĝante ĉe la tablo.

Sganarelo, ni devas pripensi nian korektiĝon, tamen.

SGANARELO

Ha ! jes.

DON JUAN

Jes, je mia fido, necesos korektiĝi. Ankoraŭ dudek aŭ tridek jarojn da tiu ĉi vivo, kaj tiam ni pripensos je ni.

SGANARELO

Ho !

DON JUAN

Kion ci diras pri tio ?

SGANARELO

Nenion. Jen estas la vespermanĝo. *(Li prenas pecon el unu el la pladoj alportitaj, kaj metas ĝin en sian buŝon.)*

DON JUAN

Ŝajnas, ke ci havas la vangon ŝvelinta : kio ĝi estas ? Parolu do. Kion ci havas ?

SGANARELO

Nenion.

DON JUAN

Montru iom. Je Dio ! Ĝi estas ŝvelaĵo, kiu falis al li sur la vangon. Rapide lanceton por trapiki tion ! La malfeliĉa knabo ne povas plu elteni, kaj tiu absceso povus lin sufoki. Atendu : vidu ĉiuj, kiel matura ĝi estis ! Ha ! fripono kia vi estas !

SGANARELO

Mian fidon, Sinjoro, mi volis scii, ĉu via kuiristo ne metis tro multe da salo aŭ pipro.

DON JUAN

Nu, sidiĝu tien, kaj manĝu. Mi bezonas cin, kiam mi estos vespermanĝinta. Ci malsatas, kiel mi vidas.

SGANARELO

Mi ja tiel kredas, Sinjoro, mi ne manĝis de hodiaŭ matene. Gustumu tion ĉi, jen kio estas kiel eble plej bona. *(al Ragoteno, kiu, ĉiufoje kiam Sganarelo metis ion sur sian teleron, forprenas ĝin, tuj kiam Sganarelo turnas la kapon.)* Mian teleron, mian teleron ! Kviete, mi petas. Virton de Dio ! baptaneto, kiel lerta vi estas doni telerojn purajn ! Kaj vi, malgranda Lavioleto, kiel vi scias prezenti ĝustatempe por trinki ! *(Lavioleto donas trinki al Sganarelo, Ragoteno forprenas ankoraŭ lian teleron.)*

DON JUAN

Kiu povas frapi tiamaniere ?

SGANARELO

Kiu je la diablo venas nin maltrankviligi dum nia vespermanĝo ?

DON JUAN

Mi volas vespermanĝi trankvile almenaŭ, kaj ke oni lasu neniun eniri.

SGANARELO

Lasu min fari, mi iras mem al ĝi.

DON JUAN, vidante veni Sganarelon timigitan.

Kio estas do ? Kio okazas ?

SGANARELO, mallevante la kapon, kiel la statuo.

La... kiu estas tie.

DON JUAN

Mi iru vidi, kaj montru, ke nenio povas min ŝanceli.

SGANARELO

Ha ! malfeliĉa Sganarelo, kie ci kaŝos cin ?

SCENO XII-a

DON JUAN, LA STATUO DE LA KOMANDORO, SGANARELO, LAVIOLETO, RAGOTENO

DON JUAN, al siaj servistoj.

Seĝon kaj manĝilaron. Rapide do. *(Don Juan kaj la statuo sidiĝas ĉe la tablo. Al Sganarelo)* Nu, sidiĝu ĉe la tablo.

SGANARELO

Sinjoro, mi ne havas plu malsaton.

DON JUAN

Sidiĝu tien, mi diras. Por trinki ! Je la sano de la Komandoro ! Mi portas ĝin al ci, Sganarelo. Oni donu al li vinon.

SGANARELO

Sinjoro, mi ne havas soifon.

DON JUAN

Trinku, kaj kantu cian kantaĵon, por regali la Komandoron.

SGANARELO

Mi estas malvarmuminta, Sinjoro.

DON JUAN

Tute egale. Ni iru. *(al siaj servistoj)* Vi, venu, akompanu lian voĉon.

LA STATUO

Don Juan, estas sufiĉe. Mi invitas vin veni morgaŭ vespermanĝi kun mi. Ĉu vi havos tiun kuraĝon ?

DON JUAN

Jes, mi iros akompanata de sola Sganarelo.

SGANARELO

Mi dankas vin, estas morgaŭ fasto por mi.

DON JUAN, al Sganarelo.

Prenu tiun lumigilon.

LA STATUO

Oni ne bezonas lumon, kiam oni estas kondukata de la ĉielo.

AKTO KVINA

La teatro prezentas kamparon.

SCENO UNUA

DON LUIZ, DON JUAN, SGANARELO

DON LUIZ

Kio ! mia filo, ĉu estas eble, ke la boneco de l'ĉielo plenumis miajn petojn ? ĉu tio, kion vi diras al mi, estas efektive vera ? ĉu vi ne trompas min per falsa espero, kaj ĉu mi povas preni ian certecon pri la surpriza novaĵo de tia konverto ?

DON JUAN

Jes, vi vidas min revenintan el ĉiuj miaj eraroj ; mi ne estas la sama homo kiel hieraŭ vespere, kaj la ĉielo subite faris en mi ŝanĝon, kiu surprizos ĉiujn. Gi tuŝis mian animon kaj malfermis miajn okulojn ; kaj mi rigardas kun terurego la longan blindecon, en kiu mi estis, kaj la krimajn malordaĵojn de la vivo, kiun mi kondukis. Mi trapasigas en mia spirito ĉiujn ĝiajn abomenaĵojn, kaj miras, kiel la ĉielo povis ilin tiel longe toleri, kaj ne faligis dudekfoje sur mian kapon batojn de sia ti-

meginda justeco. Mi vidas la indulgojn, kiujn faris al mi ĝia boneco, ne punante min pro miaj krimoj, kaj mi pretendas ilin profiti, kiel mi devas, aperigi antaŭ la okuloj de l'mondo subitan ŝanĝon, ripari tiamaniere la skandalon de miaj antaŭaj faroj, kaj penadi por ricevi de la ĉielo plenan pardonon. Jen al kio mi volas labori ; kaj mi petas vin, Sinjoro, ke vi bonvolu kunefiki al tiu projekto, kaj min helpi por fari elekton de persono, kiun mi uzos kiel gvidanton, kaj sub kies konduko mi povos marŝadi senerare sur la vojo, kien mi estas tuj enironta.

DON LUIZ

Ha ! filo, kiel facile estas revokata la fervoro de patro, kaj kiel rapide nuliĝas la ofendoj de filo ĉe la plej malgranda vorto pri pento ! Mi jam ne memoras ĉiujn malplezurojn, kiujn vi kaŭzis al mi, kaj ĉio estas forviŝita per la vortoj, kiujn vi ĵus aŭdigis. Mi ne konscias mem, mi konfesas ; mi ĵetas larmojn de ĝojo ; ĉiuj miaj deziroj estas plenumitaj, kaj mi nenion plu havas de nun por peti de la ĉielo. Kisu min, mia filo, kaj persistu, mi petegas, en tiu laŭdinda penso. Miaflanke, mi iras tuj porti la feliĉan novaĵon al via patrino, dividi kun ŝi la dolĉajn ekscitojn de la ravo, en kiu mi estas, kaj danki al la ĉielo pro la sanktaj decidoj, kiujn ĝi bonvolis inspiri al vi.

SCENO II-a

DON JUAN, SGANARELO

SGANARELO

Ha ! Sinjoro, kiel mi ĝojas vidante vin konvertitan ! Tion de longa tempo mi atendis ; kaj jen estas, dank' al la ĉielo, ĉiuj miaj deziroj plenumitaj.

DON JUAN

La peston por la simplegulo !

SGANARELO

Kiel, la simplegulo ?

DON JUAN

Kio ! ci prenas kiel bonan monon tion, kiun mi ĵus diris, kaj ci kredas, ke mia buŝo konsentis kun mia koro ?

SGANARELO

Kio ! ĝi ne estas... vi ne... *(flanken)* Ho ! kia homo ! kia homo ! kia homo !

DON JUAN

Ne, ne, mi ne estas ŝanĝita, kaj miaj sentoj estas ĉiam samaj.

SGANARELO

Cu vi ne cedas al la surpriza mirindaĵo de tiu statuo moviĝanta kaj parolanta ?

DON JUAN

Estas efektive en tio ĉi io, kion mi ne komprenas ; sed kio ajn ĝi povas esti, tio ne estas kapabla konvinki mian spiriton nek ŝanceli mian animon ; kaj se mi diris, ke mi volas korekti mian konduton kaj min ĵeti en ekzemplan vivmanieron, tio ĉi estas projekto, kiun mi formis per pura politiko, utila artifiko, necesa grimaco, al kiu mi volas min trudi, por indulgi patron, kiun mi bezonas, kaj min ŝirmi, flanke de la homoj, kontraŭ cent bedaŭrindaj aventuroj, kiuj povus okazi al mi. Mi bone volas, Sganarelo, konfidencii ĝin al ci, kaj mi estas tre kontenta havi atestanton pri la fundo de mia animo, kaj pri la veraj motivoj, kiuj min devigas fari la aferojn.

SGANARELO

Kio ! vi kredas nenion entute, kaj vi volas tamen starigi vin kiel virtulon ?

DON JUAN

Kaj kial ne ? Estas tiom multe da aliaj kiel mi, kiuj sin enmiksas je tia metio, kaj uzas la saman maskon por trompi la homojn !

SGANARELO

Ha ! Kia homo ! kia homo !

DON JUAN

Ne estas plu hontigo en tio, la hipokriteco estas malvirto moda, kaj ĉiuj malvirtoj modaj ŝatiĝas kiel virtoj. La rolo de virtulo estas la plej bona el ĉiuj roloj, kiujn oni povas ludi. Hodiaŭ la profesio de hipokritulo havas mirindajn bonaĵojn. Ĝi estas arto, kies falseco estas

ĉiam respektata ; kaj kvankam oni ĝin malhonoras, oni kuraĝas nenion diri kontraŭ ĝi. Ĉiuj ceteraj malvirtoj de l'homo estas elmetataj al cenzuro, kaj ĉiu havas permeson ilin ataki laŭte ; sed la hipokriteco estas privilegia malvirto, kiu per sia mano fermas la buŝon al ĉiuj, kaj ĝuas trankvile superestran senpunecon. Oni ligas, per multego da grimacoj, intiman societon kun ĉiuj sampartianoj. Kiu ofendas unu el ili, tiu altiras ĉiujn sur siajn brakojn ; kaj eĉ tiuj, kiujn oni scias agi bonfide pri tio, kaj kiujn ĉiu konas esti vere tuŝitaj, tiuj, mi diras, estas ĉiam la trompatuloj de la ceteraj ; ili sin ĵetas simplanime en la laĉon de la grimacistoj, kaj blinde subtenas la simiojn de siaj faroj. Kiom multe da ili, laŭ cia supozo, mi konas, kiuj, per tia artifiko, lerte revestigis la malordaĵojn de sia juneco, faras al si ŝildon el la mantelo de la religio, kaj, sub tiu respektata vesto, havas permeson esti la plej malbonaj homoj en la mondo ? Kiom ajn oni scias iliajn intrigojn, kaj oni konas ilin tiajn, kiaj ili estas, ili tamen ne ĉesas havi krediton inter la homoj ; kaj kelka mallevo de kapo, krucuma ekĝemo, kaj du okulruloj rearanĝas en la mondo ĉion, kion ili povas fari. Sub tiu favora ŝirmo mi volas min savi, kaj sendanĝerigi miajn aferojn. Mi ne lasos miajn dolĉajn kutimojn, sed mi zorgos min kaŝi, kaj gajiĝos senbrue. Se okaze mi estos malkovrita, mi vidos, ne moviĝante, miajn interesojn alpreniĝi de la tuta roto, kaj estos defendata de ĝi antaŭ kaj kontraŭ ĉiuj. Fine, ĝi estas la vera rimedo por fari senpune, kion ajn mi volos. Mi starigos min kiel cenzuristo de malpropraj faroj, juĝos malbone pri ĉiuj, kaj havos bonan opinion nur pri mi. Tuj kiam oni min ofendos eĉ iomete, mi pardonos neniam, kaj konservos tute kviete nepacigeblan malamon. Mi faros min la venĝanto de l'interesoj de l'ĉielo ; kaj sub tiu oportuna preteksto, mi puŝos miajn malamikojn,

mi kulpigos ilin pro malpieco, kaj scios elĉenigi kontraŭ ili maldiskretajn fervorulojn, kiuj, sen kono de afero, krios publike kontraŭ ili, ilin premegos per insultoj, kaj laŭte kondamnos per sia privata aŭtoritato. Tiamaniere oni devas profiti la malfortojn de la homoj, kaj saĝa spirito sin alĝustigas al la malvirtoj de sia tempo.

SGANARELO

Ho ĉielo ! kion mi aŭdas tie ĉi ? Mankis al vi nur esti hipokritulo por vin elfini ĉiupunkte, kaj jen estas la suprego de l'abomenaĵoj ! Sinjoro, tiu ĉi lasta min forportas, kaj mi ne povas deteni min paroli. Faru al mi kion ajn vi volas ; batu min, buĉu min per batoj, mortigu min, se vi volas ; estas necese, ke mi malŝarĝu mian koron, kaj kiel fidela servisto diru al vi, kion mi devas. Sciu, Sinjoro, ke tiel ofte iras la kruĉo al la akvo, ke fine ĝi rompiĝas ; kaj, kiel diras tre bone tiu verkisto, kiun mi ne konas, la homo estas en tiu ĉi mondo same kiel la birdo sur la branĉo ; la branĉo estas ligita al la arbo ; kiu ligas al la arbo, tiu sekvas bonajn instruojn ; bonaj instruoj pli valoras ol belaj vortoj ; belaj vortoj estas ĉe la kortego ; ĉe la kortego estas la korteganoj ; la korteganoj sekvas la modon ; la modo venas el la fantazio ; la fantazio estas kapablo de l'animo ; l'animo estas tio, kio donas al ni la vivon ; la vivo finiĝas per la morto ; la morto igas nin pensi pri la ĉielo ; la ĉielo estas super la tero ; la tero ne estas la maro ; la maro estas elmetita al la fulmotondroj ; la fulmotondroj turmentas la ŝipojn ; la ŝipoj bezonas bonan direktiliston ; bona direktilisto havas singardecon ; singardeco ne estas ĉe junuloj ; junuloj devas obei maljunulojn ; maljunuloj amas riĉaĵojn ; riĉaĵoj faras riĉulojn ; riĉuloj ne estas malriĉuloj ; malriĉuloj havas necesecon ; neceseco ne havas

leĝon ; kiu ne havas leĝon, vivas kiel bruta besto ; kaj sekve, vi estas kondamnita al ĉiuj diabloj !

DON JUAN

Ho ! kiel bela argumentado !

SGANARELO

Post tio, se vi ne cedas, des pli malbone por vi !

SCENO III-a

DON KARLOS, DON JUAN, SGANARELO

DON KARLOS

Don Juan, mi trovas vin ĝustokaze, kaj estas tre kontenta paroli kun vi tie ĉi prefere ol en via domo por demandi pri viaj decidoj. Vi scias ke tiu zorgo min koncernas, kaj mi prenis sur min, ĉe via ĉeesto, tiun ĉi aferon. Miaflanke, mi ne ĝin kaŝas, mi tre deziras, ke la aferoj pasiĝu kvietamaniere ; kaj nenio estas, kion mi ne faros por inklini vian spiriton, ke ĝi volu preni tian vojon, kaj por vidi vin publike konfirmantan al mia fratino la nomon de via edzino.

DON JUAN, kun hipokrita tono.

Ho ve ! Mi volus ja, el mia tuta koro, doni al vi la kontentigon, kiun vi deziras ; sed la ĉielo kontraŭstaras rekte ; ĝi inspiris al mia animo la projekton ŝanĝi mian vivon, kaj mi ne havas nun aliajn pensojn, krom tute

lasi ĉiujn ligaĵojn de la mondo, min senigi kiel eble plej baldaŭ je ĉiuspecaj vanaĵoj, kaj korekti de nun per severmora konduto ĉiujn krimajn senbridaĵojn, al kiuj min portis la fajreco de blinda juneco.

DON KARLOS

Tiu projekto, Don Juan, ne kontraŭiras mian diron ; kaj la societo de leĝa edzino povas ja sin alĝustigi kun la laŭdindaj pensoj, kiujn inspiras al vi la ĉielo.

DON JUAN

Ho ve ! tute ne ! ĝi estas projekto, kiun ankaŭ prenis via fratino ; ŝi decidis sian formondiĝon, kaj ni estis tuŝitaj ambaŭ samtempe.

DON KARLOS

Sia formondiĝo ne povas nin kontentigi, povante esti aljuĝata al la malestimo, kiun vi havas por ŝi kaj por nia familio ; kaj nia honoro postulas, ke ŝi vivadu kune kun vi.

DON JUAN

Mi certigas vin, ke tio ne povas esti. Mi ĝin deziris miaflanke kiel eble plej forte ; kaj eĉ hodiaŭ mi konsiliĝis kun la ĉielo pri tio ; sed kiam mi petis de ĝi konsilon, mi aŭdis voĉon dirantan, ke mi ne devas pensi pri via fratino, kaj ke kun ŝi sendube mi ne faros mian savon.

DON KARLOS

Don Juan, ĉu vi pensas nin ekblindigi per tiuj belaj senkulpigoj ?

DON JUAN

Mi obeas la voĉon de l'ĉielo.

DON KARLOS

Kio ! vi volas, ke mi min pagu per tia parolado ?

DON JUAN

La ĉielo volas tiel.

DON KARLOS

Vi elirigis mian fratinon el monaĥejo por lasi ŝin poste !

DON JUAN

La ĉielo ordonas tiel.

DON KARLOS

Ni suferos tian makulon en nia familio ?

DON JUAN

Turnu vin al la ĉielo.

DON KARLOS

He kio ! ĉiam la ĉielo !

DON JUAN

La ĉielo deziras tiel.

DON KARLOS

Sufiĉas, Don Juan, mi vin komprenas. Ne tie ĉi mi volas preni vin, kaj la loko ĝin ne permesas ; sed antaŭ ne longe, mi scios vin trovi.

DON JUAN

Vi faros, kion vi volos. Vi scias, ke al mi ne mankas kuraĝo, kaj ke mi scias uzi mian glavon, kiam estas bezone. Mi tuj pasos tra tiu izola strateto, kiu kondukas al la granda monakejo ; sed mi certigas al vi, ke ĝi ne estas mi, kiu volas dueli ; la ĉielo malpermesas al mi tian penson ; kaj se vi min atakas, ni vidos, kio okazos.

DON KARLOS

Ni vidos vere, ni vidos.

SCENO IV-a

DON JUAN, SGANARELO

SGANARELO

Sinjoro, kian diablan stilon vi ekuzas tie ? Tio ĉi estas multe pli malbona ol la cetero, kaj mi amis vin multe pli tian, kia vi estis antaŭe. Mi ĉiam esperis pri via savo : sed nun ja mi malesperas pri ĝi ; kaj mi kredas, ke la ĉielo, kiu vin toleris ĝis nun, tute ne povas toleri tiun lastan abomenaĵon.

DON JUAN

Iru, iru, la ĉielo ne estas tiel akurata, kiel ci pensas ; kaj se ĉiufoje, kiam la homoj...

SCENO V-a

DON JUAN, SGANARELO, FANTOMO, kiel virino kun vualo.

SGANARELO, ekvidante la fantomon.

Ha Sinjoro ! ĝi estas la ĉielo, kiu vin alparolas ; kaj ĝi estas averto, kiun ĝi donas al vi.

DON JUAN

Se la ĉielo donas al mi averton, estas necese, ke ĝi parolu iom pli klare, se ĝi volas ke mi komprenu.

LA FANTOMO

Don Juan jam havas nur unu momenton por povi profiti la indulgemon de l'ĉielo, kaj se li ne pentos tie ĉi, lia pereo estas decidita.

SGANARELO

Sinjoro, ĉu vi vidas ?

DON JUAN

Kiu kuraĝas eldiri tiajn vortojn ? Mi pensas koni tiun voĉon.

SGANARELO

Ha ! Sinjoro, ĝi estas fantomo, mi konas ĝin per ĝia marŝado.

DON JUAN

Fantomo, ombro aŭ diablo, mi volas vidi, kio ĝi estas.

(La fantomo ŝanĝas sian figuron, kaj prezentas Tempon, kun falĉilo en la mano.)

SGANARELO

Ho ĉielo ! ĉu vi vidas, Sinjoro, tiun ŝanĝon de figuro ?

DON JUAN

Ne, ne, nenio estas kapabla impresi al mi teruron ; kaj mi volas sperti per mia glavo, ĉu ĝi estas korpo aŭ spirito.

(La fantomo forflugas, samtempe kiam Don Juan volas ĝin frapi.)

SGANARELO

Ha ! Sinjoro, cedu al tiom multe da pruvoj, kaj ĵetu vin tuj en penton.

DON JUAN

Ne, ne, ne estas dirote, kio ajn okazos, ke mi estas kapabla penti : ni iru, sekvu min.

SCENO VI-a

LA STATUO DE LA KOMANDORO, DON JUAN, SGANARELO

LA STATUO

Haltu, Don Juan, vi donis al mi hieraŭ vian vorton, ke vi venos manĝi kun mi.

DON JUAN

Jes. Kien mi devas iri ?

LA STATUO

Donu al mi la manon.

DON JUAN

Jen ĝi estas.

LA STATUO

Don Juan, la pekohardeco kuntrenas teruregan morton ; kaj la indulgoj de l'ĉielo, kiujn oni resendas, malfermas vojon al ĝia fulmo.

DON JUAN

Ho ĉielo! kion mi sentas ? nevidebla fajro min bruligas, mi ne povas plu elteni, kaj mia tuta korpo farigas brulanta fajrujo. Ha !

(La tondro falas kun granda bruo kaj grandaj fulmoj sur Don Juan. La tero malfermiĝas kaj lin glutas ; kaj eliras grandaj fajroj el la loko, kien li falis.)

SCENO VII-a

SGANARELO, sola.

Ha ! mian salajron ! mian salajron ! Jen estas, per lia morto, ĉiu kontentigita. Ofendita ĉielo, transpasitaj leĝoj, delogitaj knabinoj, malhonorigitaj familioj, insultitaj gepatroj, difektitaj edzinoj, furiozigitaj edzoj, ĉiuj estas kontentaj ; nur mi sola estas malfeliĉa. Mian salajron ! mian salajron ! mian salajron !

Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

(*Sekvo.*)

ANGLUJO. — REVIEW of REVIEWS, *Norfolk street, LONDON, W. C.*

First lessons in Esperanto, by Th. Cart and J. Rhodes . . . 6 pence.
Esperanto : The Student's complete Text-Book, with two vocabularies by J. C. O'Connor Ph. Dr. M. A. 1ˢ 6ᵈ
Esperanto-English dictionary, by A. Motteau. 2ˢ 6ᵈ
English-Esperanto dictionary, by J. C. O'Connor Ph. Dr. M. A.. 2ˢ 6ᵈ
English-Esperanto dictionary, by J. Rhodes and J. Ellis (*in preparation*).
Grammar and exercises of the International Language Esperanto, by Richard H. Geoghegan. 1ˢ 6ᵈ
Dickens, Kristnaska sonorado (à Christmas Carol), tradukita de M. Vestcott. . . . . 1ˢ »

BELGUJO — HOLANDUJO. — A.-J. WITTERYCK-DELPLACE
4, Nouvelle Promenade, BRUGES

Het Esperanto in tien lessen, door A.-J. Witteryck naar Cart et Pagnier. . . . . » 50
Paĝoj el la Flandra Literaturo, tradukitaj de Dʳᵉ Seynaeve et Dʳᵉ van Melckebeke. 1 50

BULGARUJO. — KLUBO « STELO », *PLOVDIV*

Esperanto en 10 lecionoj, de Cart et Pagnier. . . . . 1 »
Unuaj lecionoj, de Cart et Atanasov. . . . . » 40
Propaganda folio. . . . . » 10

DANUJO. — ANDR.-FRED. HÖST & SÖN
Bredgade, 35, KJÖBENHAVN

Esperanto-Dansk-Norsk Ordbog, af F. Skeel-Giörling. . . . . Kr. 3 50
Grammatik. . . . . » »
Dansk-Esperanto Ordbog. . . . . » »

GERMANUJO. — MÖLLER & BOREL, *Prinzenstrasse, 95, BERLIN*

Anfangsgründe der Esperanto-Sprache, von Th. Cart und Hermann Jürgensen. . . . . M 0 30
Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache, von J. Borel. . M 1 20
Wörterbuch Deutsch-Esperanto, von Dʳ Zamenhof. . . . . M 2 »
Wörterbuch Esperanto-Deutsch, von H. Jürgensen. . . . . M 1 80
Schlüssel zum Lehrbuch der Esperanto-Sprache, von J. Borel. M 0 50
Pri unu speco de Kurbaj linioj, von Profesor A. Dombrovski. . M 0 50
Lernolibro de Esperanta Stenografio, (laŭ sistemo Stolze-Schrey) de F. Schneeberger. . . . . M 0 80

(*Turnu.*)

(*Sekvo.*)

HISPANUJO. — J. ESPASA, *579, Calle de las Cortes, BARCELONA*

Primeras lecciones de Esperanto de Th. Cart y L. Villanueva. . P 0 40
Manual y Ejercicios de la lengua internacional Esperanto, por V. Inglada Ors y A. L. Villanueva. . . . . P 3 »
Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto, por Inglada Ors y Villanueva. . . . . P 6 »

ITALUJO. — RAFFAELLO GIUSTI
53, Via Vittorio Emanuele, LIVORNO

Prime lezioni d'Esperanto de Th. Cart e Alb. Gallois 0 40
Grammatica della lingua internazionale Esperanto di L. de Beaufront, tradotta da G. Puccinelli. 1 50
L'Esperanto in dieci lezioni. di Cart e Gallois. . . . . » 75
Dizionario Esperanto-Italiano, de J. Puccinelli (*in preparazione*).
Dizionario Italiano-Esperanto, de J. Meozzini (*in preparazione*).

POLUJO. — M. ARCT, *53, Nowy Swiat, WARSZAWA*

Esperanto : Czecs I. Gramatyka i cwiczenia, Dr L. Zamenhof. . R. 0 25
— Czecs II. **Slownik**. . . . . — . . R 0 15

PORTUGALUJO. — BRAZILUJO

Primeiras lições de Esperanto, do professor Th. Cart, trad. portugueza de A.-C. Coutinho, Paris, Hachette. . . . . » 40

SVEDUJO. — *Esperantoförening, STOCKHOLM*

Esperanto-Svensk ordbok, de P. Ahlberg. . . . . Kr : 1 75

OUVRAGES DIVERS

Tutmonda jarlibro esperantista por 1905. . . . . 2 50
outurat (L.) et Leau (L.). — **Histoire de la langue universelle**. . 10 »
— **Extraits de l'Histoire de la langue universelle**. . . . . 1 »
Lafarge (G.). — **Nécessité de l'adoption d'une langue internationale auxiliaire**. . . . . 1 »
Sacré (E.). — **L'Esperanto**. . . . . 1 »
Thiaucourt (C.). — **Dernière conférence sur la Langue Internationale Esperanto**. . . . . 1 »
L'Esperanto, seule vraie solution de la langue internationale auxiliaire. . . . . » 15
Premier manuel de la langue auxiliaire Esperanto. . . . . » 10

Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

DON JUAN